


中國新道


EL POPOLA

# CINIO










La Deksep-arkaja Ponto en la Somera Palaco

Foto de LIU SIGONG



## INTER NI

### Respondo al nia leganto Simaitis

Nia sovetunia leganto B. Simaitis interesigas pri ĉinaj sporto, muziko kaj masaĝo, kaj proponis al ni malfermi rubrikojn respektive por konigi ilin. Ni dankas lin pro lia aktiva propono. Sed estas malfacile malfermi tiujn rubrikojn pro la nombro de la paĝoj. Tamen ni raportas pri ĉina sporto de tempo al tempo. Ni multe raportis pri la 11-a Azia Sportkunveno okazinta en Ĉinio pasintjare kaj aliaj grandaj sportaj konkursoj kaj amasaj sportaj ludoj. Ni konigos la luktarton Bajiquan de Cangzhou de Hebei-provinco en la 10-a numero de nia revuo. Bajiquan estas speco de amasa sporto en tiu loko.

Masaĝo estas unu el la konsistigaj partoj de la ĉina tradicia medicino, ĝi utilas por kuraci malsanojn kaj fortigi korpon. Multaj esperantistoj volas lerni masaĝon. Por kontentigi la deziron de niaj legantoj ni faris la videobendon "Ĉina Masaĝo" sub la direktado de specialistoj de masaĝo. La videobendo konigas vin kiel masaĝi por kuraci artiktordiĝon, koltordiĝon, nervan kapdoloron, malvarmumon, vomadon kaj ostajn kaj internajn malsanojn. Ni ĉiam servas al niaj legantoj, kiuj bezonas la videobendon. Prezo: 80.00US\$

**La Red.**

Fruktoj  
Foto de LIU SIGONG



# ENHAVO

- 10 Konsumo por sporto en Pekino  
 22 **Verda vivo**  
 18 Volo de surdamutuloj  
 38 La nova medikamento Fuzhengdangxie  
 35 **POR VIA SANO:**  
 Ĉigong-terapio kontraŭ koronaria kormalsano (Daŭrigo)  
 26 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
 42 **ANTIĜVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:**  
 Pensado pri tondro kaj kritiko kontraŭ sanktulo  
 30 Ma Dechang kaj liaj ombroteatraj figuroj  
 27 **ARTOJ DE ĈINIO:**  
 Galopantaj ĉevaloj  
 21 **MIRINDAĜOJ DE ĈINIO:**  
 Kernoskulpturo  
 49 **LOGDĜOMOJ KAJ MOROJ:**  
**Kvieta kaj komforta kvadrata korto de Pekino**

- 6 Ĉarma pejzaĝo de Qinhuai  
 45 Brila antikva kulturo de sterila lando  
 48 **AMUZOJ**  
 40 **KURANTAJ AFEROJ**  
 14 **Pri Esperanta literaturo**  
 16 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (8):**  
 Miyamoto Masao  
 20 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Lia plej bela ĉemizo  
 17 **ESP-NOVAĜOJ**  
 4 **INTERNI**  
 39 44 48 **KORESPONDI DEZIRAS**  
 2 La Deksep-arkaĵa Ponto en la Somera Palaco  
 4 Fruktoj  
 54 Sur la stepo de Interna Mongolio  
 36 La antikva porcelana urbeto Shenhou


Sur la kovrilo:

Ujguraj knabinoj

Foto de LIU SIGONG

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Xishuangbanna (p. 22)
2. Ledu-gubernio (p. 45)
3. Nankino (p. 6)
4. Shaanxi-provinco (p. 30)
5. Gansu-provinco (p. 30)



# Ĉarma pejzaĝo de Qinhuai



Ambaŭflanke de Qinhuai-rivero



Aĉeto de ruĝŝtonetoj de Yuhua



Teksto de LI QIANG

Fotoj de YAN JIN



Antaŭ la Templo de Konfuceo

En Zhanyuan-ĝardeno



En la ekzamenejo Jiangnan



**Q**INHUAI-RIVERO estas malgranda branĉo de Yangzi-rivero. Ĝi trafluas iam movoplenan lokon de la urbo Nankino. Tie multaj ĝardenoj, loĝdomoj, temploj, historiaj restaĵoj kaj butikoj estis forbruligitaj de japanaj agresantoj en la 30-40-aj jaroj kaj fariĝis preskaŭ ruinoj.

En la lastaj jaroj la Nankina Registaro rekonstruis tie la Templon de Konfuceo por rememorigi pri li, antikva ĉina edukisto kaj filozofo. Laŭ Qinhuai-rivero oni starigis konstruaĵojn en antikva stilo, tetrinkejojn, restoraciojn kaj vendejojn unu apud alia por reaperigi la fizionomion de la antikva ĉefurbo kaj la pejzaĝon de suda Ĉinio, kaj la loko fariĝis turisma centro kun kulturaj kaj komercaj instalaĵoj.

En la pasinta aŭtuno mi vizitis Nankinon. Gastama mastro invitis min ekskursi sur Qinhuai-rivero por ĝuigi al mi ĝian ĉarman pejzaĝon.

Qinhuai-rivero ne estas tiom longa kaj tiom larĝa, kiom mi imagis. Ĝi estas tre malgranda. Ĝia parto, kiu servas al turistoj, longas nur unu kilometron kaj larĝas nur 50 metrojn. 4-5 plezurŝipoj jam estas granda ŝarĝo por ĝi.

Tamen, sidante en la ŝipo kaj rigardante ambaŭflanken, oni povas tuj ĝui la pejzaĝon sude de Yangzi-rivero. Ĉe la bordoj ne troviĝas balustrado nek libera spaco, sed diversformaj domoj en antikva stilo. La gravuraĵoj sur fenestroj rigardantaj al la rivero estas antikvecaj kaj belegaj. La iom suprenlevitaj ekstremoj de firstoj kaj diversformaj muroj donis la impreson, kvazaŭ tiuj antikvecaj loĝdomoj estas tre malpezaj kaj povas moviĝi. Precipe iliaj inversaj ombroj en la rivero pli reliefigas ilian belecon.

La Templo de Konfuceo sidas tuj apud la rivero. De la antikveco la loko estas movoplena. Nun sur la malnova bazo oni rekonstruis ŝtonan pordegon kaj starigis la bil-


dosteleon pri Konfucea etiko gravuritan en 484. La rekonstruata halo kun alteco de 18 metroj jam ricevis rudimentan formon.

Tamen min allogis ne tiuj antikvecaj konstruaĵoj de la templo, sed komercaj stratoj ambaŭflanke de ĝi. Unu larĝas malpli ol 10 metrojn kaj estas pavimita per gruzoj. Ambaŭflanke staras butikoj unu apud alia en antikva stilo. Eble pro la famo de Konfuceo oni vendas senescepte antikvaĵojn, kalfigraĵojn, sigel-gravuraĵojn, penikojn, *xuan*-paperojn, tuĉbastone-tojn, ink-frotujojn kaj diversajn memoraĵojn. Estas ankaŭ ĝuo, se oni rigardas ilin anstataŭ aĉeti. Precipe rulŝtonetoj de Yuhua, produktaĵoj de Nankino, kun diversaj vejnoj kaj belaj koloroj estas ŝatataj de vizitantoj.

Kun granda plezuro mi promenis ankaŭ sur alia strateto, kie estas bazaro de floroj, birdoj kaj fiŝoj. Aromis diverskoloraj freŝaj floroj. Ilin aĉetis nemalmultaj, ĉefe gejunuloj.

Standoj de orfiŝoj, tropikaj fi-

Maskoj de pekina opero montrataj en la Templo de Konfuceo





soj kaj birdoj estis ĉirkaŭitaj de viroj, kiuj juĝis, diskutis, eble marĉandis. Mi neniel povis enpremiĝi en ilin por klare vidi.

Tie mi renkontis maljunulon, kiu diris, ke li jam emeritiĝis. Li kaj lia edzino bredas du vazegojn da tropikaj fiŝoj. Ĉiutage ili estas okupitaj pri flegado de la fiŝoj. Nun ili venis aĉeti nutraĵon por la fiŝoj. Li trovis gaja amuzo sidi antaŭ la vazegoj por rigardi tiujn tropikajn fiŝojn libere naĝantajn.

La templo altiris min ankaŭ per lunĉejoj kun diversaj etmanĝaĵoj. Mi estis feliĉa preni manĝaĵojn en la restoracio Qinhuai Renjia. Servisto 9-foje prezentis al mi etmanĝaĵojn, ĉiufoje 3 specojn.

Viziti la ekzamenejon Jiangnan estis ĉefa enhavo de mia turisma vojaĝo laŭ Qinhuai-rivero. Multaj ne scias, kia estas la ekzamenejo. Ĝi estis loko, kie oni ekzamenis kandidatojn en la feŭda socio de Ĉinio. Poste Ĉinio lernis la modernan lernejan sistemon de la Okcidento, ekpraktikis la novan sistemon en la komenco de la ku-



Lunĉejo sur strato


ranta jarcento kaj abolis la imperiestran ekzamenan sistemon, nur tiam la ekzamenejo Jiangnan ĉesis funkcii.


Jiangnan kun 20 644 malgrandaj ĉambroj por ekzamenado kaj loĝado de kandidatoj estis la plej granda ekzamenejo en suda Ĉinio. En la 20-aj jaroj plejparto de ĝiaj konstruaĵoj estis malkonstruita kaj en ilia bazo oni starigis bazaron.

Nun tie oni rekonstruis kelkajn halojn kaj 40 tiajn ĉambrojn kaj en la ĉambroj estas eksponataj olelampoj, paperoj, penikoj, tuĉbastonetoj uzitaj de kandidatoj. En 4 ĉambroj staras argilaj statuoj de kandidatoj submetitaj al ekzameno de verkado. En la ĉefhalo estas ekspozicio de la ĉina antikva eduka sistemo. En festotagoj aŭ ĉefsezono de turismo aktoroj prezentas programeron pri feŭda ekzameno, ke la vizitantoj kvazaŭ travivas ĝin.

Zhanyuan-ĝardeno allogas la vizitantojn al la kvieta medio per karakterizaĵoj de suda klasika ĝardeno. Tri artefaritaj montetoj inter kioskoj kaj pavilonoj estas la plej okulfrapaj. Iu estas kruta, alia serpenta kaj tria impona. Malsupren de ili lirlas malgrandaj fluoj. Ambaŭ estas en ĉarma kontrasto. ■


La Templo de Konfuceo en malproksimo





En trejna kurso

Pafado






# Konsumo por sporto en Pekino

Teksto de DA WEI

Fotoj de CHUN GENG kaj DA WEI




Instrumenta sporto



Maljunaj geedzoj kaj ilia korpo-saniga ĉaro



Junulo sin ekzercanta



**E**N la lastaj jaroj senĉese ŝanĝiĝis la vivmaniero de pekinanoj. Se vi promenas sur strato aŭ en parko, vi vidas multajn personojn, kiuj en sportaj vestoj kaj ŝuoj kuras, sin ekzercas per tajĝičuan kaj ĉigong-o aŭ dancas diskon. Pekinanoj tion faris multajn jarojn. Nun iuj komencis elekti novan sporton. Ili ne domaĝis pagi por akiri ŝancon sisteme ekzerciĝi 2-3-foje ĉiusemajne. Oni nomas ilin "sportaj loĝantoj". La Pekina Sporta kaj Korpokultura Komisiono anoncis, ke Pekino nun havas 4 milionojn da sportaj loĝantoj. Tiom da sportaj loĝantoj estigis novan konsumon en Pekino, t.e. konsumon por sporto. Tio alportis grandan profiton al sporthaloj, stadionoj, trejnaj kursoj kaj sportaj vendejoj.

### PROSPERA "SANIGA URBO"

Antaŭ kelkaj monatoj en la subtera trejnejo de Yuetan-sporthalo aperis "saniga urbo". Laŭdire ĝi estas la plej granda sportejo por la loĝantoj de Pekino.

En ĝia ĉambro de korpo-beliga gimnastiko mi vidis pli ol 100 homojn sin trejni kun granda intereso imitante la movojn prezentitajn de kolora televidilo. Preskaŭ ĉiuj trejnatoj estis junaj kaj mezaĝaj virinoj. Iu junulino diris al mi, ke ŝi sin trejnigis tie unu monaton kaj pro tio ŝia korpopezo malpliĝis je 5 kg. Ĉiutage ŝi estas energioplana post trejnado.

Najbare de la ĉambro de korpo-beliga gimnastiko estas ĉambro de instrumenta sporto. Tie trejniĝas junuloj. Direktoro Chen diris, ke tie ne mankas

instrumentoj por ekzerci la muskolojn de la homa korpo. Kaj "saniga urbo" postulas ne tro multan pagon. Ĉiumonate partoprenanto pagas nur 40 juanojn por unu el la sportoj.

Junuloj ŝvitis kaj anhelis pro trejnado. Iu el ili, laboranto de la Metiarta Galerio, diris al mi: "Ĉu troviĝas junulo, kiu ne volas fariĝi forta, ke oni lin rigardu envie? Ĉi tie estas ĉiaj instrumentoj kaj la kondiĉoj por trejnado multe pli bonaj ol tiuj en la hejmo. Kvankam 40 juanoj konsistigas preskaŭ kvinonon de mia monata salajro, tamen ili estas pagindaj.

Iu junulo, ekzercanta siajn gambojn per instrumento, estis dikmuskola. Ŝajne li trejnigis sin longan tempon. Mi interparolis kun li kaj informiĝis ke li laboras en ĉina-alilanda hotelo. Ĉiumonate li enspezas 400-500 juanojn kaj ne estas malfacile por li pagi 40 juanojn por la trejnado. Tuj en la tago de la inaŭguro de la "saniga urbo" li venis sin anonci por la trejnado. Antaŭ tio li ekzercis sian korpon jam du jarojn en sia hejmo. Li trovis agrabla sin ekzerci du horojn ĉiutage. Same kiel junuloj, kiuj ĉagreniĝas pro manko de loko kaj kondiĉoj de ekzercado, li esperas pli multajn "sanigajn urbojn".

Sun Yukun, ĝenerala direktoro de la "saniga urbo", diris al mi, ke nun oni deziras ne nur vestojn kaj manĝaĵojn, sed ankaŭ sanon kaj belecon de la korpo. Ĝuste pro tio ili investis multon por konstrui la "sanigan urbon". Laŭ nekompleta statistiko, en kelkaj monatoj tie jam estis pli ol 20 000 homfojoj por trejnado. Plejparto de la trejnatoj estis 18-44-jaruloj.

La "saniga urbo" havas pli ol 10 instruistojn, kiuj ĉiuj estas trejnistoj de ŝtata nivelo. Ili gvidas lernantojn en scienca trejnado. Se nur la lernantoj prezentas ĉiujn donitaĵojn de sia korpo al la komputilo de la vivokontrola centro en la "saniga urbo", ili povas tuj ricevi detalan planon pri nutrado kaj sporto taŭgan por ilia sanstato.

### MULTIĜO DE PAFO-AMANTOJ

Post la Azia Sport-

Ekzercado en mateno





kunveno okazinta en 1990 en Pekino, la malmulte atentita Pekina Pafejo en la okcidenta antaŭurbo estas frekventata de pafantoj. Ĝia respondeculo diris al mi, ke ĝis nun venis pafantoj 4 000-foje. Antaŭ du jaroj la pafejo akceptis ĉefe alilandanojn. Nun ĝi akceptas ne nur organizitajn oficistojn, laboristojn, vendistojn, kuracistojn kaj lernejanojn, sed ankaŭ individuajn paf-amantojn, kiuj pagis el sia propra poŝo.

Li diris tri kaŭzojn: unue, influite de la Azia Sportkunveno oni pliinteresiĝas pri sporto; due, pro rigoraj reguloj pri tenado de pafiloj nemalmultaj el la ĉinoj opinias la armilojn misteraj kaj deziras mem sperti pafadon; kaj trie, kun pliboniĝo de la popola vivo multaj personoj ekŝatas amuziĝon per sporto utilan al sano.


Mi informiĝis, ke tie la pafado estas pagipova por la ordinaraĵoj. Ĉiu kuglo por etkalibra pistolo aŭ fusilo kostas unu juanon (20 usonaj cendoj); por pafi flugantan teleron per ĉasfusilo oni devas pagi 4 juanojn ĉiufoje, kio estas la plej alloga amuzo. Mi renkontis 4 junulojn, kiuj venis en la pafejon por festi la naskiĝtagon de unu el ili. Ili pafis per pistolo kaj pafis ankaŭ flugantan teleron per ĉasfusilo, por kio ili pagis cent juanojn kaj foriris kun ĝojo. Administranto diris al mi, ke inter la pafantoj troviĝas ankaŭ geamantoj. Ili ĝojis pro trafo kaj bedaŭris maltrafon. Eble tio estas pli interesa kaj pli romantika ol promenado en parko kaj rigardo de filmo.

Rilate seninterrompan fluon de paf-amantoj, la administrantoj de la pafejo kaj ĝojas kaj maltrankvilas. Nun la pafejo ankoraŭ povas kontentigi la bezonon de pafantoj. Se plimultiĝas la pafantoj, ili devas vicatendi por pafado.

## **KORPO-SANIGAJ INSTRUMENTOJ ĈIAM PLI DEBITAJ**

El la objektoj por sporto la sportaj vestoj kaj sportaj ŝuoj estas plej multe konsumataj. En la 80-aj jaroj sportaj ŝuoj de Nike-kompanio de Usono la unuaj venis en Pekinon. Post nur kelkaj jaroj aperis en la ĉina merkato dekoj da specoj da sportaj ŝuoj kun diversaj markoj, ĉu importitaj, ĉu faritaj de Ĉinio, ĉu kune produktitaj de Ĉinio kaj alia lando. Antaŭ 5-6 jaroj nur 1-2 vendejoj en Pekino vendis sportajn vestojn kaj sportajn ŝuojn. Nun troviĝas jam pli ol dek tiaj vendejoj. Ĉiu granda aŭ mezgranda magazeno vendas tiajn varojn.

La Centro de Sportaj Objektoj Lisheng ĉe Wangfujing-strato estas la plej granda tiaspeca vendejo en Pekino kaj ĉiutage ĝiaj kvar etaĝoj estas plenplenaj de klientoj. Ĝia direktoro Yin diris al mi, ke sole en la pasinta jaro la vendovaloru de la centro superis 100 milionojn da juanoj. Estas rimarkinde, ke idm post iom multiĝas ne nur la vendokvanto de




En vendejo de sportaj objektoj


sportaj vestoj kaj sportaj ŝuoj, sed ankaŭ tiu de mez- kaj malgrandaj korpo-sanigaj instrumentoj, ekz. korpo-saniga ĉaro kaj surplanka boato ĉiu kostanta 700-800 juanojn, masaĝa seĝo kostanta 1 000-2 000 juanojn, instrumento por kuro kaj plurfunkcia instrumento. Antaŭe unumonata vendovaloro estis pli ol 100 000 juanoj kaj nun ĝi kreskis kelkoble. El la supraj objektoj nemalmultaj estis aĉetitaj de privatuloj.

Unu korpo-saniga ĉaro okupas areon de malpli ol unu kvadrata metro. Familio kun iom vasta loĝejo starigas la ĉaron en dormoĉambro, vestiblo aŭ balkono, por ke ĉiuj ĝiaj anoj povu laŭvice sin ekzerci 3-5 minutojn, kio alportas al la familio etoson de konkurso kaj apartan ĝojon. Kompreneble, nemalmultaj el tiuj korpo-sanigaj instrumentoj estas importitaj kaj ilia prezo iom alta. Ilin aĉetas ĉefe tiuj, kiuj havas bonan salajron aŭ iom vastan loĝejon, ekz. kantistoj, aktoroj, privataj komercistoj kaj malmultaj intelektuloj. Estas malfacile pli vaste popularigi tiujn instrumentojn, tamen ili jam aperis en iuj familioj.

Konsumo por sporto en Pekino prezentas novan situacion kaj la konsumo merkato havas grandan latentan forton .



La aŭtoro



**BAKIN:**

*La artikolo de Bakin, la honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fama ĉina literaturisto, temas ne nur pri literaturo, sed ankaŭ pri Esperanta tradicio, la genezo kaj evoluo de Esperanto kaj la kialo de ĝia sukceso. La artikolo plena de lakona kaj preciza rezonado estis publikigita en la gazeto "Verda Lumo" en 1930. Ĉi-sube estas la unuaj paragrafoj de la artikolo.*

**La Red.**

## **LA GENEZO; LITERATURO ESTAS NECESA KAJ NEEVITEBLA**

Estas tute senbaze, se iu nun ankoraŭ persistas, ke Esperanto ne havas literaturon. Dum multaj jaroj ni senĉese penadis por pruvi, ke Esperanto estas tute taŭga por literaturo, kaj en mia artikolo "Ĝenerala vido pri Esperanta verkado" mi prezentis al la legantoj la kuriozajn florojn de Esperanta verkado. Sed iuj ankoraŭ diras, ke Esperanto ne taŭgas por literaturo; tio multe mirigis min.

Kiel la lingvoj povus ekzisti sen literaturo? Literaturo estas la centro de beleco de lingvo, la sango fluas tien por esti purigita, kaj poste refluas en diversajn partojn de la viva korpo. Viva lingvo bezonas literaturon, ĝuste kiel homo la koron. Lingvoj ekzistas ne sole por komerco kaj scienco, sed ankaŭ por literaturo.

Kiu povus malpermesi al iu paroli pli bele kaj pli lerte ol aliaj? Ĉu ĉiuj devus paroli en la sama lingvo ŝablona, banala kaj seka? Ni ĉiuj havas la deziron pri belo. La deziro foje estas latentaj, sed nemalkonfesebla. En la antaŭhistoria tempo, primitivuloj jam povis fari ujojn el falintaj arboj kaj gravuri per pintigita ŝtono diversajn hom-figurojn sur tiuj kru-daj ujoj. Tio ja estis la genezo de belarto.

Ankaŭ tiel estas en parolado: parto de la homoj ŝatas kanti rimajn frazojn aŭ rakonti historion, pli belsone ol aliaj. Ĉu iu ajn povus malpermesi al talentulo paroli aŭ verki pli ĉarme ol lia najbaro okupiĝanta pri komercado?

Same kiel en tio, ankaŭ erudito-esperantisto ne estas escepto. Ankaŭ ni bezonas literaturon.

Mi ekzemplu. En Universala Kongreso de Esperanto hispana junulo enamiĝis al sveda knabino. Post la kongreso ili revenis hejmen respektive, sed korespondado kunligis ilin. Li ne komprenis la svedan lingvon kaj ŝi — la hispanan. Sed ili ambaŭ kom-

prenis Esperanton. Por montri sian amon en pli bela formo, la pasia junulo verkis entuziasman poemon en Esperanto. Esperanto estis la lingvo de ilia amo. Eble antaŭ sia enamiĝo li neniam legis poemon en Esperanto, sed, ĉu li povus ne verki poemon, kiam li falis en pasian amon? Ankaŭ tio estis unu el la genezoj de literaturo. Tio estas neevitebla.

## **ĈU ESPERANTO NE HAVAS TRADICION?**

Sed ankoraŭ kelke da personoj persistas en la antaŭjuĝo, ke ni ne havas literaturon, ĉar Esperanto estas tro artefarita kaj ne havas tradicion.

Fakte tio ne estas vera. Nia lingvo konsistas el du partoj: la "Unua Libro" kaj ĉio alia.

## **TRADICIAJ RADIKVORTOJ**

En la "Unua Libro" de Zamenhof troviĝas centoj da radikvortoj majstre elektitaj de la genia lingvisto post longtempa uzado, praktiko kaj verkado. Ili estis elektitaj el la komunaj vortoj en la eŭropaj lingvoj, sed ne arbitre elpensitaj de Zamenhof. Devenante de vivaj lingvoj, ili posedas la tutan vivipovon de la longa tradicio de tiuj vivaj lingvoj.

Ĉiu radikvorto havas sian historion. Ĉiu radikvorto estis kreita de iu malnova nacio kaj poste estis aplikata de aliaj nacioj. Multaj el la radikvortoj trapasis jam milojn da jaroj, de kiam ili estis parolataj de primitivaj hind-eŭropaj nacioj en aziaj montoj, sed nur la fonetiko iom post iom ŝanĝiĝis.

Kompreneble la vortradikojn sekvas kelke da artefaritaj finaĵoj, tamen tiuj finaĵoj estis ekstraktitaj el naturaj lingvoj. Ankaŭ vortfarado de Esperanto estis artefarita, sed kiulingva ne estas artefarita?

## **NATURA EVOLUO DE LINGVO**

La tuta Esperanto nature evoluis el malmultaj materialoj. Zamenhof kaj frutempaj verkistoj esprimis siajn sentojn en Esperanto, kaj tio kreis at-



# Pri Esperanta literaturo

mosferon, en kiu la malnovaj hind-eŭropaj radikvortoj donis al ni la tutan forton de sia longa ekzistado.

Dum uzado la novaj lingvoj senĉese ricevas novajn necesajn radikvortojn; la kreiĝo de la novaj radikvortoj estas tute natura. Lingvo perfektiga en uzado, kaj pli kaj pli vastiga la aplikado de la lingvo pro la kreskanta nombro de novaj adeptoj. Same kiel aliaj vivaj lingvoj, Esperanto ne estas senŝanĝa, ĝi progresas en ĉiu tago.

## KIEL EVOLUAS KAJ MORTAS TRADICIAJ VORTOJ?

Malnovaj hind-eŭropaj radikvortoj bone vivas en la freŝa atmosfero kaj preskaŭ neniom perdis je sia malnova tradicio. Greftite sur la vivan trunkon de la nova lingvo, la malnovaj radikvortoj pli kaj pli prosperiĝis kaj fariĝis nova arbo plena de ruĝaj floroj kaj verdaj folioj.

Krom la centoj da malnovaj radikvortoj, ĉiuj aliaj en nia nova lingvo nature kreskas. Same estas por aliaj lingvoj. Se vi malfermos novan vortaron, vi povos rimarki, ke multaj novaj vortoj ne estis difinitaj de Zamenhof. Ili estis alpruntitaj de aliaj lingvoj, renkonteblaj en verkoj de iuj verkistoj. Post multfoja uzado oni rekonis la valoron de ilia ekzistado.

Do kiel oni povus aserti, ke Esperanto estas tro artefarita kaj sentradicia?

Kompreneble ne. Esperanto estas tute natura. Same kiel aliaj lingvoj, Esperanto havas sian tradicion (kvankam tiu estas tre juna), kaj ankaŭ la respektindan tradicion de ĝia radikvortaro. Neniu el la radikvortoj ne vivis pli ol milojn da jaroj.

## ĈIE ESTAS LA VIVO DE LINGVO

Kie ekzistas lingvo? Ĉu sole en gramatiko aŭ vortaro? Ne, absolute ne. Lingvo estas ĉe la buŝo de la vivantoj kaj sub la plumoj. Kie oni bezonas paroli, verki kaj skribi leteron, tie neniam pereos la lingvo. Kie oni uzas la lingvon, tie estas la vivo de la lingvo. Same kiel vivipova herbo, ĝi reproduktiĝas sub kareso de printempa zefiro, malgraŭ ke oni bruligos ĝin. Uzado ja estas la printempa zefiro, dum la lingvo estas akvo, kaj la uzado estas filtrilo. Kiam la vortoj kaj esprimoj fluis en la mondon post multjara uzado, parto el ili fariĝis maltaŭga, same kiel sablo sedimentis post filtrado, dum la klara akvo daŭre

fluas antaŭen.

Tiamaniere evoluas kaj prosperas la lingvoj. Lingvo similas al floro, dum la sono de nacio de la lingvo similas al printempa zefiro. La zefiro disportas la polenon ĉien tra la mondo. La komuna ideo kaj sento estas nutraĵo por la lingva floro, kiu unuigas la nacion, kuraĝigas la poetojn de la nacio kaj kreas la nacian spiriton.

## KIAL SUKCESIS ESPERANTO?

Nia majstro Zamenhof bone komprenis la kialon. Tial li donis al ni nur minimumajn materialojn, por ke la uzantoj de Esperanto kreu la vortojn, la esprimojn kaj la sintakson, nome ĉion necesan por la lingvo. ■

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
<b>Por aliaj landoj en Eŭropo:</b>				
	USD	11.50	18.50	26.00
<b>Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:</b>				
	USD	7.80	12.50	17.50

# Miyamoto Masao

de CHEN YUAN



S-ro Miyamoto Masao (la dua de maldekstre) sur la Granda Muro en 1985

En 1963 japanaj esperantistoj atendis nian viziton al Japanio, kaj ni venis en Hongkong por atendi vizon, sed ne ĝisatendis. Ni devis reveni en Pekinon. Informiĝinte pri tio, s-ro Miyamoto tre koleris kaj verkis la supre menciitajn versojn. Li estis entuziasma kaj agema. En 1973 mi renkontis lin en Tokio. En la sekva jaro, kiam oni organizis grupon de japanaj esperantistoj por viziti Ĉinion, ni pensis, ke li venos kiel grupano, sed efektive ne. Nur en 1985, kiam "El Popola Ĉinio" celebris sian 35-jaran jubileon, li venis inter la ĉinajn esperantistojn. En te-kunsido mi kaj li sidis ĉe sama tablo kaj interparolis multe pri la pasinteco, nuntempo kaj estonteco. Li korespondis kun s-ro Ĵelezo, sed ne kun mi. Tamen nelonge post sia reveno al Japanio li sendis al mi sian verkon "Vortaro Japana-Esperanta". Sur ĝia titolpaĝo li skribis ĉinlingve:

*Al sinjoro Chen Yuan*

*La 4-an de junio 1985  
Miyamoto Masao*

La vortaro estas lukse bindita, eldonita en 1982, sen prezo. Ĝia postskribo montris, ke ĝi estis kompilita ekde la 3-a de majo 1973 (antaŭvespere de nia vizito al Japanio), post 5 jaroj finiĝis la kompilado kaj en 1982 finiĝis la korektado. Kompilado de vortaro estas temporaba. S-ro Miyamoto kompilis la vortaron 9 jarojn. Dume li ankaŭ esperantigis multajn verkojn kaj verkis originale. En la Oriento li estis unu el la malmultaj laŭdindaj esperantistoj, kiuj diligente laboris por Esperanto kaj multe kontribuis al ĝi. ■

**E**N mia kajero estas jena noto:

"La 15-a de septembro 1963. Dimanĉo. Hieraŭ mi ricevis poŝtkarton de s-ro Miyamoto<sup>1</sup>, kun jenaj versoj:

*Flamu la indigno  
kontraŭ la malamiko sen digno,*

*Flamu la kamaradeco  
en batala mezo.*

Tio estas lia protesto kontraŭ la japana registaro, ke ĝi rifuzis fari vizon por ĉinaj esperantistoj (Ĵelezo<sup>2</sup>, Zou Guoxiang<sup>3</sup> kaj mi), tiel ke ni ne povis viziti Japanion." La poŝtkarto jam malaperis, tamen en mia kajero restas liaj emociple-naj versoj.

1. Miyamoto Masao (1913-1989) ek-lernis Esperanton en 1934. De 1962 li eldonis siajn Esperantajn tradukojn kaj diskonigis precipe japanajn literaturajojn, utaojn kaj hajkojn.
2. Ĵelezo tiam estis vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.
3. Zou Guoxiang, laboranto de EPĈ.



● Antaŭtagmeze de la 26-a de majo 1991, pli ol 50 membroj de la Pekina Esperanto-Asocio kunsideis en Pekino kun s-ro Dietrich Meusel, esperantisto el Germanio. Tuj alveninte al la kunsido, li brakumis s-ron Liu Beihai. Ili korespondis 8 jarojn, tamen neniam intervidiĝis. Ili ambaŭ tre emociiĝis de la renkontiĝo. Laŭ peto de la ĉeestantoj, li parolis pri la nuntempa germana E-movado.

● Lastatempe en Pekino eldoniĝis la volumo 8-a de la «Geologio Internacia» kune redaktita de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Internacia Scienca Asocio Esperantista. La volumo entenas 22 disertaĵojn de 33 sciencistoj el Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Hungario, Pollando kaj Brazilo. La enhavo de la volumo ĉefe rilatas al la fronto de la nuna internacia geologia scienco, ekz. prognozo de sismo, inĝenieria sismo, regionigo de sismo, inĝenieria geologio, struktura fiziko kaj elstariĝo de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo.

La enhavo de tiu volumo estas riĉa kaj multampleksa, la disertaĵoj estas altnivelaj kaj laŭdataj de la internacia geologia rondo. Ĝia apero antaŭenpuŝos la aplikadon kaj disvolviĝon de Esperanto en la scienca kaj teknika kampo. La libroj de tiu volumo vendiĝas ĉe la libroservo de UEA.

● Invitite de la Changzhou-a Filio sub la Ĉina Agrikultura Banko, s-ro Takeuchi Yoshikazu, delegito de la superaj oficistoj de bankoj de Taketuki kaj lia edzino s-ino Takeuchi Tomiko, vizitis la urbon Changzhou kune kun aliaj membroj de la Japana-Ĉina Amika Vizitgrupo al Ĉinio.

S-ro Takeuchi Yoshikazu estas prezidanto de la Kansaja

Esperanto-Ligo kaj prezidanto de la Taketuki-a Esperanto-Asocio. Li kaj lia edzino unue partoprenis en aktivadoj de la Renkontiĝa Semajno de ĝemelaj urboj Changzhou kaj Taketuki, poste vizitis la Changzhou-an Agrikulturan Bankon. Zhang Changsheng, oficisto de la banko kaj prezidanto de la Changzhou-a Esperanto-Asocio servis kiel interpretisto. La intervidiĝo de ambaŭ flankoj akcelos la amikan kunlaboron de financaj rondoj de la du ĝemelaj urboj.

● Novaj E-klubo estas kreitaj en marto, 1991 respektive en Santa Cruz del Norte, en orienta Havano kaj en Palaco de la Revolucio en Havano, Kubo. La estraro de Kuba Esperanto-Asocio estas renovigita en la 16-a de marto, 1991, en Havano kaj konsistas el la prezidanto Pablo Roberto Morales, vicprezidanto Juan Lazaro Besada kaj 6 sekretarioj. La Esperanto-festo okazas la trian semajnon de ĉiu monato en la Arta Galerio de Havano ekde la 17-a de aprilo, 1991, kadre de Esperantaj konferencoj, kanzonoj, ekspozicioj kaj aliaj kulturaj aferoj en Esperanto.

● Dum la regula jarkunveno de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj en Ilidz/a oni celebris ankaŭ la 35-jaran jubileon de "Jugoslavia Fervojisto", organo de la asocio. Tiuokaze oni eldonis specialan filatelistan "maksikarton" kaj en la poŝtoŝeĉo Ilidz/a funkciis la tutan tagon speciala stampilo.

● La Bruno Gröning-amikaro, kiu okupiĝas pri spirita saniĝado, dum la jarfina kunveno en Kolonjo konvinkiĝis pri la neceso uzi Esperanton en internaciaj rilatoj. Intertempe komenciĝis la tradukado en Esperanton de la enkondukolibro pri la saniĝodoktrino de Bruno Gröning, kiu famiĝis dum la kvindekaj jaroj pro la okazintaj amasosaniĝoj. Kon-



S-ro Takeuchi Yoshikazu (la dua de maldekstre) en Changzhou

taktadreso por interesuloj: Detlef Meier, Marktplatz 8, D-W-6050 Offenbach, Germany.

● Rumanaj instruistoj de Esperanto kunvenis kun eksterlandaj kolegoj dum semajno-daŭra Metodika Seminario aŭspiciata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ankaŭ radiokursoj kaj universitataj programoj de Esperanto estas reestablitaj. Kaj la internacia ekzameno de ILEI/UEA, ĝis nun la plej granda sesio de la restarigitaj ekzamenoj estis unuafoje ofertita en Rumanio.

● Enhavoriĉa kaj belaspekta faldprospekto pri VIENO denove eldoniĝis en Esperanto. Bonvolu mendi ĝin ĉe: Wiener Fremdenverkehrsverband, Obere Augartenstr. 40, A-1020 Wien, Aŭstrio.

● En la kvartalo "La Defense", la plej grava komerca kaj merkata centro en Francio, situanta inter Rueil kaj Parizo, troviĝas fama restoracio "L' ESPERANTO", kiu malfermiĝas ĉiutage de la 10-a ĝis la 22-a horo kaj regule proponas al vi "muzikan koktelon" ekde la 19-a horo. Ĝia direktoro proponas al la direkto, ke s-ro Ludoviko Zorka, prezidanto de la E-klubo en Rueil-Malmaison kaj aktivulo de Esperanto-movado prelegu pri la Internacia Lingvo al la gekelnejoj de la ok surlokalaj restoracioj.

# Volo de surdamutuloj

de CHENG GANG

**E**N pentraĵa ekspozicio okazinta en Ŝanhajo japana pentristino estis allogita de freŝkolora ĉinstila pentraĵo pri pavo. Kiam ŝi renkontiĝis kun la aŭtoro Wu Zhenzi, ŝi mire trovis, ke li estas surdamutulo. Kaj ŝi petis de li la permeson publikigi liajn verkojn en Japanio.

Wu Zhenzi, honorita per titolo de "majstro de pentrado de pavo", kaj lia edzino Zhou Qin estas bildoprojektistoj de la Ŝanhaja Unua Prestinktura Fabriko. Zhou estas ankaŭ la unua surdamuta magistro en Ĉinio. La produktaĵoj projektitaj de la geedzoj estas tre ŝatataj de klientoj en- kaj eksterlandaj, tial ili plurjare akiris la superan premion "Premio de Cent Floroj" de la ĉina

tekstila industrio. Wu Zhenzi kaj Zhou Qin estis instruitaj en la Ŝanhaja Teknika Lernejo por Surdamutaj Junuloj. La lernejo jam elkulturis ĉ. milon da lernantoj, kies mirinda laboro multe honoris ilian lernejon, kiu jam travivis 35 jarojn.

Ankaŭ Dai Mu, rektoro kaj unu el la fondintoj de la lernejo, estas surdamuta. Li estas fama edukisto por surdamutuloj kaj funkcias kiel prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Surdamutuloj.

Per mimiko li sciigis al mi, ke en la kvindekaj jaroj la registaro fondis la lernejon por kulturi mezgradajn surdamutajn teknikistojn, kaj nun realiĝis la celo.

Tiu ĉi mezgrada teknika lernejo por surdamutuloj, ununura en

Ĉinio, sidas en la mezo de la urbo. Ĝi estas kvieta ĝardeno en movoplena urbocentro. En la kvaretaĝa porinstrua domo kun areo de 3 000 kvadrataj metroj, kvankam mi ne aŭdis voĉlegadon kiel en aliaj ordinaraĵoj, tra la fenestro mi tamen vidis, ke instruisto esprimriĉe, mimike donas lecionon, helpate per skribado sur nigra tubulo, la lernantoj absorbite "aŭskultas" la lecionon. La rektoro per mimiko sciigis al mi, ke tiuj lernantoj estas elektitaj post ekzameno el la diplomitoj de la surdamutulaj lernejoj de naŭ lernojaroj en diversaj lokoj de la lando, kaj ke ĉiujare la lernejo akceptas nur 70-80 lernantojn, tial ili ĉiuj rigardas la ŝancon valora kaj studas diligente.

Lernantoj de la lignaĵa fako en praktiko



Wu Zhenzi kaj lia edzino Zhou Qin







Rektoro Dai Mu kaj lernantinoj

La Ŝanhaja Teknika Lernejo por Surdamutaj Junuloj havas kvar studfakojn, nome belartan, lignaĵan, metalprilaboran kaj tajloran. Kaj ĉiuj studfakoj estas de kvar lernoĵaroj. La rektoro sciigis al mi, ke oni funkciigas tiujn fakojn, konsiderante ne nur trajtojn kaj ŝatojn de la surdamutuloj, sed ankaŭ la socian bezonon, ke la diplomitoj bone ludu sian rolon en la socio.

En la kvar lernoĵaroj la lernantoj devas lerni ĉiujn bazajn lernobjektojn, kiujn lernas la lernantoj de mezgradaj fakaj lernejoj. Plejparto de la fakaj libroj uzataj de la lernejo estas kompilita por tri-lernoĵaraj lernantoj de altlernejo. Kaj la instruistoj de la lernejo kompilis la ceterajn. En la kvara lernoĵaro la lernantoj estas senditaj por fari praktikadon en entreprenoj, kiuj havas eblecon dungi ilin. Post ilia diplomitiĝo la entreprenoj dungas iujn el ili, kaj ceteraj estas

la Wuxi-a Littuka Fabriko, estas modela laboristo de Jiangsuprovinco. La produktaĵoj projektitaj de li havas grandan debiton, interalie la littuko kun bildo "Printempa Bambuo" estas juĝita kiel bonkvalita produktaĵo de la Ĉina Tekstila Ministerio. Xie Hongbin, belartista de la Ŝanhaja Belarta Filmstudio, projektis por ĉ. 40 pentrajaj filmoj figurojn kun trajtoj iom troigitaj kaj reliefigitaj, kiuj estis ŝatataj de la spektantoj. Kaj li estis akceptita kiel membro de la Ĉina Filmista Asocio.

La rektoro sciigis al mi ankaŭ, ke la grava faktoro por la sukceso de la lernejo estas aro da instruistoj, sin dediĉantaj al la edukado de la surdamutuloj. La lernejo havas pli ol 50 instruistojn, plejparto el ili diplomitiĝis de normalaj altlernejoj, kaj la ceteraj estis elstaraj diplomitoj de la lernejo kaj instruistoj de praktikaj teknikoj engaĝitaj de la socio. La ĵus venintaj

postenigitaj de la laboragen-tejo de la registaro. Neniu el la diplomitoj de la lernejo estas senlabora, kion admiris ĉiuj vizitantoj (la lernejon vizitis personoj el 28 landoj).

La diplomitoj de la lernejo nun laboras ĉefe en la entreprenoj de tekstila industrio, malpeza industrio kaj ekstera komerco en dekkelkaj provincoj kaj municipoj. Multaj el ili faris grandan kontribuon al la ŝtato. Pan Yongyuan, projektisto de

nesurdamutaj instruistoj devas unue lerni mimikon antaŭ ol doni lecionon. Tial ili ofte estas en la loĝejo de lernantoj kaj lernis de ili mimikon. Por plejparto de la lernantoj de la belarta fako estas la unua fojo lerni la bazajn sciojn de belarto, ĉar ili estas sufiĉe grandaj en aĝo, la plej juna estas jam 16-jara, tial por ili estas malfacile lerni belarton. Pro tio instruistoj instruis ilin serioze, por ke ili bone uzu penikon en pentrado. Mi konatiĝis kun multaj instruistoj de la lernejo, kiuj diris al mi, ke ili amas sian laboron, influate de la rektoro.

Pro meningito la 66-jara rektoro surdamutiĝis en la aĝo de 8 jaroj. En la 16-jara aĝo li diplomitiĝis per elstaraj atingoj en privata lernejo por surdamutuloj de Ŝanhajo. De tiam li sin dediĉas al la eduka afero de surdamutuloj. Antaŭ 1949 li trifoje funkciigis lernejon por surdamutuloj en Changzhou, Hangzhou kaj Ŝanhajo, tamen li malsukcesis ĉiufoje pro manko de helpo de la registaro. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio li laboras en la Eduka Buroo de Ŝanhajo kaj zorgas pri klerigo de surdamutuloj. Li fondis la Ŝanhajan Teknikan Lernejon por Surdamutaj Junuloj kaj gvidis rekompiladon de la ĉina mimiko por forigi la ambiguojn en la mimiko ekzistantajn en malsamaj lokoj de la lando.

La ĉina registaro ĉiujare donis al tiu lernejo 0.5 milionon da janoj (krom la fonduso de konstruo), kio signifas, ke la meznombra monsumo por ĉiu surdamuta lernanto estas duoble pli granda ol tiu por lernanto de ordinara altlernejo. La surdamutaj lernantoj loĝas en la lernejo, kaj la manĝado, loĝo kaj kuracado estas senpagaj por ili. Ĉiumonate la lernantoj ricevas certan sumon da mono por aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn. Lernanto de tiu lernejo esprimis sian volon: "Nenian ĝenon en la vivo ni havas, ni decidis diligente lerni kaj fariĝi elstaraj diplomitoj kaj utilaj al la socio por danki nian lernejon." ■

**L**A Melo-monto situas sur la limo de nia antikva pitoreska urbo. Oni diras, ke la monteto ricevis tiun nomon pro tio, ke en pli fruaj tempoj promenantoj tie ofte vidis melojn. Kiuj veraj geknaboj el la antaŭurbo ne konas ĝin? Kun siaj malgrandaj kavoj, etaj ravinoj, facilaj kaj malfacilaj grimpovojetoj, praaĝaj arbegoj, densa arbedaro kaj herbejaj areoj, ĝi estas kreita kvazaŭ por la geknaba romantiko. Ĉarmaj, agrablaj promenvojetoj kun etaj lokoj kun benkoj kaj belaj belvidejoj ĝin konigis trans ĝia kvartalo.

Pasintan dimanĉon pro kara rememoro mi ree min direktis tien, al ĝiaj intimaj loketoj, ligitaj kun miaj karaj rememoroj, kaj al ĝia gajplena ludoplaco, kiu, kiel atendite kiel ĉiam kaj kiel en tempoj de miaj knabaj jaroj, estis plena de viveca movado, kurado, vokado de gajaj kaj petolaj geknaboj.

Iom mi maltrankviligis tie ekvidinte, ke kaduka ligna stangeo de malnova simpla barilo estis derompita kaj ke granda najlo danĝere elstaris de paliso. Zorge mi ekenpensiĝis, kie mi tion tuj sciigu kaj postulu, ke la damaĝo kaj precipe la nuda najlo estu tuj forigataj.

Kiam en tiuj ĉi zorgoj kaj pensoj mi profundigis, nur kelkajn paŝojn for de la placo, min tiris el la pensoj subita ekkriego de infano kaj singulta ploregado. La bruo de

la aliaj ĉesis. — mi reen kuris, — mia spiro ekhaltis: malgranda knabo, el ege disiĝa vundo de lia brako elfluas sango! Sed subite reliefigis el la geknaboj svelta, forta junulo, kiu impete tiregis sian ĉemizon de sur sia korpo kaj haste deŝiregis de

kuris kun li al la proksima strato, petis la unuan aŭtomobiliston: “Mi petas, kun li en hospitalon!” Li sukcesis, sidigis la vunditon en la aŭtomobilon. Klak, la motoro akre ekmurmuris, la aŭtomobilo forrapidegis.

“La etulo estas eble ses jarojn aĝa, kial mi ne tuj igus, ke la infanoj ĉesu en sia ludado kaj mi almenaŭ per ŝtono debatus la elstarantan najlon,” premis min mia konscienco.

De la aliaj geknaboj mi poste eksciis pri la junulo: Lia nomo estas Karolo, buĉistolernanto, loĝas ĉe sia majstro. Mi iris al tiu kaj rakontis al li la malfeliĉon kaj pri lia Karolo. “Kion, sian novan ĉemizon li disŝiris?! — bonega junulo!” kortuŝite la majstro respondis kaj klarigis: “Li aĉetis la ĉemizon nur antaŭhierau; de sia unua salajro. ‘Estas mia plej bela ĉemizo, kiun mi ĝis nun havas!’ li diris, montrante ĝin al mi plena de ĝojo ventinte de la butikoj.”

Li rakontis al mi ankaŭ, ke Karolo antaŭ kvar semajnoj ĉe li ek-lernis. Li devenas de tre malriĉa familio el Mühl-regiono, ekonomie malforta parto de la lando. Li estas saĝa knabego kaj certe estus taŭga por pli alta profesio. — “Nu, eble mi povos foje pli fari por li”, li diris. Post tio mi adiaŭis la bonan majstron. — Kaj mia ĝojo estis ne eta, ke mi la junulon taksis sama. ■

## Lia plej bela ĉemizo

de **GOTTFRIED HOFSTATTER** (Aŭstrio)

ĝi longan strion, premvindis lokon antaŭ la vundo sur la brako de la tremanta etulo; la sangado ĉesis. Alian strion li deŝiris de la ĉemizo kaj per ĝi li bandaĝis la vundon. Tiam li enbrakigis la knabeton,






# Kerno- skulpturo

Fotoj de WU XINHUA



Maljuna feo



Skulptado sur juglando



Incensujo, boato kaj snuffbotelo

Oni skulptas malgrandan kernon, por ke ĝi fariĝu eleganta artaĵo. La kernoskulpturo originas el la tradicia mikroskulpturo de Ĉinio. En Ming-dinastio (1368-1644) ĝi atingis altan nivelon. Antaŭe kleruloj sin amuzis per ĝi. La kernoskulptaĵoj kun poemo, kaligrafiaĵo, pentraĵo k.a. meritas aprecon kaj konservon. Tamen la arto estas vaste konata nur post kiam la kernoskulptaĵo de Du Langui, loĝanto de Weifang, Shandong-provinco, estis premiita en la Panama Foiro en 1915. La 84-jara Kao Gongqing, daŭriganto de la afero de Du Langui, pro la granda aĝo ne plu okupiĝas pri kernoskulpturo. Lia ununura metilernanto Wang Xude jam sufiĉe bone posedas la arton. Li povas skulpti vivoveran homan kapon sur kerno granda kiel rizgrajno. Aparte mirindas, ke al boato, kernoskulptita de li, alkraciĝas tre maldika ankro.

# Verda vivo

Teksto de ZHANG MEIZHI

Fotoj de LIU SIGONG



**C**E la subiro de la suno ruĝe brilas Luosuo-rivero, kiu kvazaŭ brila rubando iras ĉirkaŭ verda insulo, kie troviĝas la Xishuangbanna-a Botanika Ĝardeno de Tropikaj Vegetaĵoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Oni nomas ĝin ankaŭ "Xiaomenglun-a Botanika Ĝardeno".

Tie estas regno de tropikaj vegetaĵoj. En mia memoro eŭforbioj (*Euphorbia pulcherrima*) kreskas ekskluzive en florpotoj en Pekino, sed ĉe la enirejo de la ĝardeno arbe staras du eŭforbioj kun abundaj frondoj. Vere okulfrapaj ili estas en tiu verda medio. Interne de la enirejo etendiĝas aleo kun olepalmoj grandaj, ventumilformaj ambaŭflanke. Ankaŭ ili estas raraj en Pekino. Pli profunde kreskas bamburoj, aromaj vegetaĵoj, oledonaj plantoj, drogherboj k.a. Kvankam mi ne tuj rekonis tiel multe da kreskaĵoj, tamen ili ĉiuj forte interesis min.

Tiunokte, mi kaj mia kolego noktis en la ĝardena gastejo. Tie la medio estas belega, precipe en la mateno, kiam maldensa nebulo kovras la teron. Tie kuŝas ponteto, malsupre de ĝi, en la lageto prosperas lotusoj. Laŭdire, tie estis lotuso-reĝo kun gigantaj folioj, sur kiuj infano povis sidi sekure. Tiam lotusoj floris kaj oni trovis la lotuso-reĝon. Trans la lageto staras grandaj, kuriozaj arboj, kies nomon mi ne sciis je la unua rigardo. La formo de ilia trunko similas al kalabaso. Ilia bazo estas dika, la meza parto — maldika kaj la supra parto — dika. Poste mi informiĝis, ke ili estas hindaj palmoj, originalaj arboj inter tropikaj vegetaĵoj. Ĉiuj vizitantoj de la ĝardeno ŝatis foti sin antaŭ ili.

Loĝinte kelkajn tagojn en la ĝardeno, mi informiĝis, ke tie estas ne nur scienc-esploro de tropikaj


plantoj de Ĉinio, sed ankaŭ turisma loko en sudokcidenta Ĉinio. Iom post iom mi turnis mian atenton de plantoj al tieaj sciencistoj. S-ro Xu Zaifu, estro de la ĝardeno kaj botanika profesoro, vivis ĉ. 30 jarojn sur tiu verda insuleto. Rememorante la pasintecon, li estis emociita. Li diris al mi, ke en 1959 profesoro Cai Xitao, fama ĉina botanikisto, gvidante dekelkajn sciencistojn, venis ĉi tien el Kunming. Tiam en tiu ĉi dezerta loko vivis nur 7-8 dajaj familioj. Konstruite provizorajn kabanojn, ili enloĝiĝis, ekspluatis eksperimentajn kampojn, bedojn kaj finkonstruis botanikan ĝardenon de tropikaj vegetaĵoj, la plej grandskalan en Ĉinio. Nun en la ĝardeno kreskas 3 000 specoj da tropikaj vegetaĵoj, el kiuj 1 000 estis enkondukitaj el aliaj landoj. Tie oni starigis eksperimentejoj de diversaj plantoj, diversajn laboratoriojn por servi al la scienca esploro, ekzemplero-domon kaj bibliotekon. Nun en la ĝardeno funkcias 3 esplorojoj, laboras 270 teknikistoj kaj laboristoj.

Poste s-ro Xu konigis al mi la scienc-esplorajn objektojn kaj sukcesojn de la ĝardeno. Li diris, ke dum enketo pri la sovaĝvegetaĵaj riĉfontoj de Xishuangbanna ili trovis multajn drogajn vegetaĵojn. Nun ili jam ordigis 500-600 specojn da drogoj, el kiuj iuj estas bonefikaj en kuracado, ekz., kontraŭkancera majteno (*Maytenus hookeri*) kaj daemonoropo (*Daemonorops draco*), la lasta malkovro de profesoro Cai Xitao. Nun ili estas gravaj materialoj de 7 farmaciaj fabrikoj de Yunnan. En Xishuangbanna ili kulturis menglun-pampelmusarbojn sur 2 000 muoj (unu hektaro=15 muoj) da kampoj. La tieaj pampelmusoj estas grandaj, bongustaj kaj sukoriĉaj. En 1987 la princo Philips, edzo de la brita





Palmoj en botanika ĝardeno



Cikaso konata kiel reĝo de la saguarboj



reĝino, manĝinte ilin, diris ke ili estas la plej bonaj pampelmusoj.

Ĉiuj teknikistoj, kun kiuj mi kontaktiĝis en la ĝardeno, informis al mi, ke unu el la plej gravaj scienc-esploraj fruktoj en la lastaj jaroj estas starigo de naturparko de kuriozaj tropikaj vegetaĵoj alfrontantaj pereon, ĉar sur la Tero malpliigas arbaroj, kaj animaloj kaj vegetaĵoj estas grave damaĝitaj. Laŭ takso, 15% de la bestoj kaj vegetaĵoj forpereos antaŭ la jaro 2000. Pro tio, la internacia socio faris sloganon "Savi vegetaĵojn signifas savi la homaron mem." La naturparko estas destinita por studi kiel krei la vivmedion por la pereontaj vegetaĵoj. En la 80-hektara naturparko kreskas 2 000 specoj da tropikaj plantoj. Teknikisto Li Baogui akompanis min en vizito de la naturparko. Laŭ pado ni penetris en la arbaron. Tie staras arboj altaj kaj malaltaj; grimpas ĉie longaj lianoj; la tero kovriĝis de densaj folioj. En tiu obskura arbaro ni vidis arbon kun granda apog-radiko. Li Baogui diris, ke tio estas unu el la ĉefaj trajtoj de primitiva arbaro. Antaŭe tie estis tropika pluarbaro.

Forlasinte la naturparkon, akompanate de Li Baogui mi promenis en la ĝardeno. Tie la kuriozaj tropikaj vegetaĵoj multe interesis min, ekz., dancanta herbo (*Codariocalyx motorius*), magiaj fruktoj kapablaj dolĉigi acidaĵojn, manilkaroj (*Manilkara zapota*)... Montrante iun malgrandan arbon, Li Baogui konigis al mi, ke ĝi, malkovrita kaj nomita de profesoro Tao Guoda, nomiĝas verda umeo de Banna. Profesoro Tao estas feliĉa, ĉar estas tre malmultaj botanikistoj, kiuj povas oficiale nomi vegetaĵon. Li estas sciencisto, kiu plej longe faris kampan enketon kaj konas plej multe da vegetaĵoj.

Tao Guoda, altastatura kaj maldika mezaĝulo, havas tute ordinaran aspekton, tamen, li akiris la Premion de Kampa Laboro en la nomo de Zhu Kezhen, la plej altan honoron de la kampa laboro en Ĉinio. Kiam li aperis antaŭ mi, li aspektis lacega, ĵus elhospitaliĝinte sen permeso de kuracisto. Li diris al mi, ke la kampa laboro estas peniga. Rostate de la suno kaj atakate de la pluvo, oni devas ofte suferi malsaton. Ifoje ilin trafas sovaĝbesto. Plenuminte taskon en la lastfoja kampa laboro, li malsaniĝis. Pri verda umeo de Banna, li klarigis al mi, ke ĝi apartenas al la familio dipterokarpaceo (*Dipterocarpaceae*) kaj estas tipa tropika arbo. Antaŭe iuj eksterlandaj botanikistoj opiniis, ke ne ekzistas tropika pluarbaro en Ĉinio, ĉar ni ne trovis vegetaĵojn de dipterokarpaceo. En 1976, oni trovis paraŝoreon (*Parashorea chinensis*) en Mengla-a naturparko de Yunnan kaj poste, verdan umeon de Banna. Ili ambaŭ apartenas al dipterokarpaceo. Tio pruvis, ke Ĉinio havas tropikajn pluarbarojn. Iutage en 1983, sur la revena vojo de surkampa enketo, kiam ili ripozis sub arbo, ili hazarde vidis sur malproksima monto planton similan al tiu de dipterokarpaceo. Komence ili ne kredis tion, ili do rigardis per teleskopo, poste prenis ĝiajn branĉojn por studi kaj fine konkludis, ke ĝi estas vegetaĵo de dipterokarpaceo. Ekscitite de granda ĝojo, ili daŭre serĉis ekzemplerojn sur monto, tute forgesinte la malsatan stomakon.

Post kiam mi aŭskultis la rakonton de s-ro Tao, aperis en mia kapo la demando, kia koloro devas esti la homa vivo. Se ĝi havas koloron, do, certe estas verda la vivo de la homoj, kiuj vivas sur tiu malgranda insulo ĉirkaŭita de grandaj montoj. ■




Floranta ĉina cidonio







Bambuo



Esplorado

Eksperimento pri ekologia kulturado de plantoj



### TRAJTOJ DE ĈINAJ URBANINOJ

Antaŭ nelonge la Psikologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj faris esploron pri la trajtoj de ĉinaj urbaninoj. Oni povas dividi la trajtojn de ĉinaj urbaninoj en kvar tipojn: malbonkvalitaj, bonkvalitaj, societemaj kaj karieremaj. La malbonkvalitaj trajtoj estas: avareco, vantemo, babilemo, klaĉemo, ĵaluzo, egoismo, monavido, dependemo, arbitro, kaŝemo, ploremo, konfidemo, malcedemo kaj regemo super edzo. La bonkvalitaj trajtoj estas: zorgemo pri aliaj, bonkoreco, diligento, simpatio, toleremo, helpemo, sinoferemo, ĉasteco, respekto kaj prizorgo de gepatroj kaj bogepatroj. La societemaj trajtoj estas: societemo, ŝato de kontakto kun viroj kaj intereso en vastaj kampoj. La karieremaj trajtoj estas: zorgo pri ŝtataj aferoj, ambicio, kompetenteco en laboro, respondeco kaj lernemo, kiuj montras, ke la ĉinaj virinoj pli kaj pli zorgas pri sia kariero.

### BANKO DE SPERMO EN QINGDAO

Banko de homa spermo de la Hospitalo sub la Qingdao-a Medicina Instituto, konstruita en 1984, estas la plej granda banko en Ĉinio en tiu kampo. Ĝis la 2-a de julio de la lasta jaro, oni faris gravedigan operacion al 1 846 virinoj, inter kiuj 846 virinoj sukcesis gravediĝi kaj 356 beboj jam naskiĝis. En la lastaj jaroj, venis ankaŭ virinoj el Hongkong, Singapuro, Usono, Kanado k.a. por la operacio. Tie estas dekoj da vazoj fridigataj per likva nitrogeno, en kiuj konserviĝas la spermo de volontuloj. La laboro de la hospitalo alportis feliĉon al multaj antaŭe seninfanaj familioj.

Edzo devas akompani sian edzinon por la operacio. En la lastaj ses jaroj, kvankam neniam okazis, ke geedzoj malakordas pri la heredeco de la naskiĝinta bebo, tamen por eviti eventualan malagrablajn, la hospitalo difinis, ke geedzoj devas samtempe veni kaj subskribi leĝan kontrakton, kies kopioj devas esti tenataj respektive de la tri flankoj. La ĉesto de la edzo ebligas al kuracistoj elekti la spermon de volontulo, kies staturo kaj vizaĝo pli similas al tiuj de la edzo.

Inter la spermo-donintoj estas kadroj, instruistoj kaj sciencaj laborantoj, kiuj estas klerigitaj en altlernejo. Ili kaŝe kontaktiĝas kun la hospitalo kaj la spermo-donintoj ne konas unu alian. Antaŭ la enmeto en la bankon oni faras registradon al la spermo sub la kuna kontrolo de flegistino kaj kuracisto. Post la enmeto en la bankon neniu scias, al kiu la spermo estos liverota.

Estas virinoj, kiuj venis kun emocio al la hospitalo por la operacio kaj post la gravediĝo tute silentis kontraŭ la leteroj de la hospitalo. Tamen la statistiko de la hospitalo montras, ke la sukcesaj gravedigaj operacioj atingis 26%, kaj tiu cifero estas sufiĉe

granda en- kaj eksterlande.

### MAGNETA PORDO — LA PLEJ ANTIKVA SEKURIGA STACIO

Ĉiuj konas la nunan sekurigan stacion, tamen malmultaj scias pri la plej antikva sekuriga stacio en la mondo. La unua sekuriga stacio en la mondo estis la magneta pordo de Epang-palaco de Qin-dinastio (221-207 a.K.) en Ĉinio.

En la tria jarcento a.K. ĉinoj jam havis sciojn pri magneto kaj inventis kompason.

En 212 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio konstruigis grandan konstruaĵaron sude de Weiherivero en la nuna Shaanxi-provinco kaj ĝia fronta konstruaĵo estis Epang-palaco. Por la sekureco de la palaco oni konstruis el magneto la nordan pordon, tra kiu devis pasi senditoj de aliaj regnoj. Se iu kaŝe portis armilon, oni povis trovi ĝin, kiam li trapasis la pordon. La posteuloj nomis la pordon "magneta pordo". La ruino situas sude de la urbeto Sanqiao apud Xi'an. Tie restas nur teraso de pli ol 200 kvadrataj metroj.

Esploro atestas, ke la armiloj uzataj en la periodo de Qin-imperio estis faritaj el fero kaj alojo de kupro kaj nikelo.

### TRE OKUPITA LA UNUA MEMPAGA ELDONEJO EN PEKINO

Tre okupita estas la unua mempaga eldonejo en Pekino, Wenjin-eldonejo, al kiu verkistoj venis unu post alia. Aro da valoraj akademaj verkoj kaj legaĵoj estas mempage eldonitaj, kio atentigis la socion al la eldonejo.

La eldonejo eldonas verkojn, pri kies enhavo la verkintoj respondecas, kies eldonan koston ili mem pagas kaj kies eldonrajton ili posedas. En la pasintaj kvardek jaroj Ĉinio permesis nur laŭplanan eldonadon, kaj la mempaga eldonado estas nova afero aperinta nur en la lastaj kelkaj jaroj, kio donas al pli multaj homoj ŝancon disvolvi sian talenton. Tio estas reformo por solvi la malfacilon de libroeldonado.

Plejparto el la pli ol 30 specoj da eldonitaj libroj estas akademaj. La eldonejo egale traktas verkojn de malsamaj skoloj kaj malsamaj akademaj vidpunktoj kaj instigas eldonadon de verkoj havantaj specialajn vidpunktojn kaj kreivan spiriton.

La respondeculoj de la eldonejo diris, ke la eldonejo ne ĉesas profiton kaj racie pagas al la aŭtoroj eldonan koston. De tiuj aŭtoroj, kies verkoj estas akademie valoraj kaj kiuj ne povas pagi la eldonan koston, la eldonejo postulas parton aŭ neniom da pago de administrado. Tial la eldonejo estas bonvena al la akademaj rondoj.



# Galopantaj ĉevaloj

de CHEN SI

**E**N la moderna pentrista rondo de Ĉinio estas nemalmultaj personoj, lertaj en pentrado de ĉevaloj. El ili la plej elstara estis Xu Beihong, kiu per hela kaj malhela koloroj de ĉina inko prezentis bravajn ĉevalojn. Antaŭ nelonge la Centra Televido de Ĉinio konigis alian pentriston, kiu akiris admiron de la publiko per sia giganta liberstreka pentraĵo "Galopantaj Ĉevaloj" 4.5 m alta kaj 40 m longa. Li estas Zhang Qingbao.

La 40-jara Zhang Qingbao naskiĝis en fora montvilaĝo de Jishan-gubernio, Shanxi-provinco. En tiu ĉi avare naturdotita loko oni devis multe ŝviti por la vivtenado. Tio tamen ne subigis lian aspiron al belo kaj arto. Influante de sia patro, popola artmetiisto, li komencis sian pentradon en la infaneco. Oni ofte vidis lian malgrasan figuron pentrantan sur kampoj, antaŭ domoj kaj sub arboj. Li propraokule vidis la penigan laboron de la kamparanoj en la terkulturado, bone sciis, kiel gravaj estas ĉevaloj por la terkulturistoj. Tial li havis grandan ŝaton al la ĉevaloj.

Plenkreskinte, li studis en la arta fakultato de la Shanxi-a Universitato. Tie li lernis ĉefe la ĉinan pentradon, kaj ankaŭ olepentradon, ksilografion kaj freskofaradon. En sia kelkdek-jara

artista vivo li pene strebis kaj, nur en la mezaĝeco, li estis arte edifita de la ĉevaloj pene laborantaj sur la Leŭsa Altebenaĵo. Li opinias, ke en la lastaj jaroj aperis tro multe da subtilaj verkoj en la pentraĵa kampo, kiuj estas kompreneble necesaj por ĝuo kaj distro, tamen estas pli necesaj la verkoj prezentantaj la persistemon kaj bravecon de la ĉina nacio en la strebado.

Zhang Qingbao teorie studis pri la movada regulo de la ĉevaloj kaj iliaj ostaro kaj muskolaro, kaj ofte veturis al la stepo de Gansu-provinco por pririgardi ĉevalojn. Tie li profunde infektiĝis de la bravaj karakteroj de la loĝantoj de nordokcidenta Ĉinio. En liaj okuloj la ĉevaloj estas simbolo de la persistemo de la tieaj loĝantoj. La kunfandiĝo de la teorio kaj praktika observado faris liajn pentraĵojn kaj fidelaj al la vivo kaj pli altaj ol ĝi. Tial liaj pentraĵoj pri ĉevaloj estas unuigo de la praktika vivo kun la arta celo.

Sur liaj paperoj foje estas greĝo da ĉevaloj, foje nur unuopa. Kiam li pentras ĉevalaron, li akcentis la harmoniecon de la greĝo, sed neniam poluris ilin aparte. Kiam li pentras unuopan ĉevalon, li turnas sian atenton al prezento de la braveco de la ĉevalo per ŝanĝiĝo de la denseco de la inko kaj variigo de la stre-



Zhang Qingbao



koj por klare vidigi la bravecon de la ĉevalo.


Li pentras per malsamaj pentrmanieroj. Jen li konturas la ĉevalon per malmolaj lakonaj strekoj por impresigi simple kaj vigle, jen li pentras per forta inko por vidigi la fortikan korpon de la ĉevaloj, kompreneble iam li ankaŭ pentras per maldensa inko por fari la ĉevalojn nebulecaj.

La supre menciitaj trajtoj estas nedisigeblaj de la senlaca strebado de Zhang Qingbao. Strebante al la impreso de giganta fresko, li kreive enkondukis la ĉinan kaligrafion en la pentradon. Li pentras per ŝtonhakista streko por ke liaj verkoj havu kaj la tradiciajn trajtojn de la liberstreka pentraĵo kaj la modernan abstraktan belecon.


Kiel provo de nova pikturo, la verkoj de Zhang Qingbao kompreneble ne estas perfektaj, tamen liaj specifa stilo kaj kreivo montras disvolviĝon de la ĉinaj pentraĵoj en la moderna socio. ■

Galopantaj ĉevaloj









Ma Dechang en manipulado de ombroteatraj figuroj

CHEN SI:

# Ma Dechang ombroteatraj

**M**A Dechang estas simpla grizhara maljunulo kun aspekto de nordokcidentano de Ĉinio. Laŭ lia aspekto oni neniel povas identigi lin kun artisto. Sed fakte li estas artisto, kiu dediĉas sian tutan vivon al kolektado kaj farado de ombroteatraj figuroj, tradiciaj en Ĉinio. En la pasintaj dekoj da jaroj li kolektis pli ol 2500 delikatajn ombroteatrajn figurojn faritajn de antaŭ 600 jaroj. Inter ili troviĝas ombroteatraj figuroj en la ĉina popola rakonto "Jinshan-templo Inundita", roloj en klasikaj romanoj, diabloj kaj demonoj en mito, birdoj, bestoj, arboj, floroj, herboj k.a. La tuta kolekto inkluzivas grandajn figurojn kiel totemo kaj malgrandajn kiel tablo, seĝo kaj benketoj. La grandaj kolektaĵoj estas pli altaj ol vera homo, dum la malgrandaj malpli ol 30 centimetrojn altaj. La tranĉoj estas delikataj, la koloroj freŝaj kaj la plastiko bela. Ĉiuj tiuj figuroj estis akiritaj en nordokcidenta Ĉinio, tial ili senescepte portas la nuancon de la Loesa Altebenaĵo.

Ombroteatraj figuroj, origine nomataj lampombraj figuroj, devenis de papertondaĵoj. Per specialaj instrumentoj, artistoj tondis ombroteatrajn figurojn el ledoj de bovo, azeno kaj aliaj bestoj kaj kolorigis ilin. Dum prezentado la aktoroj manipulis la figurojn per bastonoj ligitaj kun ili, kaj en lumo la figuroj projekciigis kiel ombro sur ekrano.


Ombroteatro havas longan historion en Ĉinio. Esplorado raportis, ke ĝi naskiĝis en la nordokcidentaj provincoj Shaanxi kaj Gansu. Historiaj libroj notis, ke 114 jarojn antaŭ Kristo mortis unu el la amataj kromedzinoj de imperiestro Wudi de Handinastio. Li dronis en granda malĝojo, ne volante trinki nek manĝi. Por konsoli la imperiestron, iu venigis nekromanciiston, asertante, ke ĉi tiu povas revidigi al la imperiestro la forpasintan kromedzi-

non. En nokto la nekromanciisto starigis ŝtofon sur placo en la palaco kaj petis la imperiestron stari fore de la ŝtofo. Sur la ŝtofo aperis ombro de la svelta kromedzino faranta diversajn pozojn. Tio rememorigis al la imperiestro la pasintaĵojn. Eble oni povas diri, ke tio estis la rudimento de ombroteatro. En la dinastioj Song kaj Yuan (960-1368) la ombroteatra arto de Ĉinio enportiĝis en la Sudorientan Azion kaj fariĝis distraĵo en armeo. Poste la ekspedicio de Yuan-dinastio portis la arton en la Okcidentan Azion kaj Eŭropon. Fama germana poeto Goeto regalis siajn gastojn per ombroteatro ĉe la 31-a datreveno de sia naskiĝtago.

Nun, kvankam oni havas multajn distraĵojn, tamen ombroteatro daŭre estas multe ŝatata amuzo de la popolo de la Nordokcidenta Altebenaĵo. En tempo sen kamplaboro preskaŭ ĉiuj vilaĝoj invitas ombroteatran trupon. Kutime tia trupo konsistas el 5-6 aktoroj. Unu azeno jam sufiĉas por porti la tutan rekviziton en du kestoj. La trupoj turneas en la kamparo, kaj la programeroj estas tute konataj de la kamparanoj. La unua programero ĉiam estas "Tri Deziroj", kultanta diojn. Ĝi esprimas la tri dezirojn de la ĉinoj: riĉa vivo, promociiĝo kaj longa vivo. Malgraŭ tranĉa frostoj la tuta vilaĝo kolektiĝas antaŭ la scenejo por ĝui la spektaklon. La alta muziko kaj gaja rumoro vigligas la kvietan vilaĝon.

Ma Dechang naskiĝis en izolita montvilaĝo en Gansu. La loko estis unu el la luliloj de la ĉina nacio. Sed malaperis tie la prosperaj arbaroj, kaj oni vidas nur kalvajn montojn, kie eĉ herboj ne kreskas. Tamen Ma Dechang ne malesperiĝis pro la magra tero, sed male, pli obstinis en la arta strebado malgraŭ la peza ŝarĝo de la vivo. Jam en lia junaĝo lia patrino lernigis al li la arton. Ŝi estis ordinara kamparanino, sed lerta en pentrado kaj papertondado. Sub ŝia

# kaj liaj figuroj



influo Ma Dechang de la infaneco ensorbiĝis en ombroteatro. Tage li laboris sur la kampo kaj nokte li lernis fari ombroteatrajn figurojn. Ofte li kun granda intereso ludis sola per siaj figuroj. De tiam li decidis kolekti la plej bonajn ombroteatrajn figurojn de Ĉinio por montri ilin al la popolo.

Sed la sorto estis kaprica. Kiam Ma Dechang estis 30-jara, li devigite forlasis sian hejmlokon kaj venis al Xinjiang. Dum tiu tempo liaj du filoj perdiĝis kaj lia edzino forpasis pro malsano. Perdiĝis ankaŭ liaj valoraj ombroteatraj figuroj ne facile kolektitaj en dekelke da jaroj. Kia bato por li! Sed li eltenis la baton, dank' al la nefleksebla karaktero de nordokcidentano. Li verŝis sian tutan amon sur la ombroteatran arton. En la aĝo de 54 jaroj li revenis al la hejmloko kaj denove komencis sian artan strebadon. Por kolekti kuriozajn ombroteatrajn figurojn, li elspezis sian tutan monon ŝparitan dum dekoj da jaroj. Se li informiĝis, ke ie estas ombroteatraj figuroj konservitaj longan tempon, li ne domaĝis altan pagon al vojevadanto por vidi ilin. Krome li ankaŭ helpis junulojn en farado de modernaj ombroteatraj figuroj. Cetere li longe turneis kun ombroteatra trupo en montvilaĝoj. En prezentado li dronis en ekstazo, forgesante la malfeliĉojn kaj ĉagrenojn alportitajn al li de la mondo.

La verkoj kolektitaj kaj faritaj de Ma Dechang vekis la atenton de fakuloj en kaj ekster la lando. Li partoprenis en la Unua Arta Festivalo de Ĉinio kaj 11 el liaj kolektaĵoj estis enskribitaj en la "Ĉinan Belartan Enciklopedion". Multaj fremdlandanoj vizitis Ma Dechang por havi la plezuron aprezi lian kolekton. Ili konsciis la veron de la arto kaj komprenis, kial la dezerta Nordokcidenta Altebenaĵo de Ĉinio povis naski tiel belan kaj emocian arton. ■

Figuroj de klasika ombroteatro







Portado de palanqueo

Transiro de maro





Sceno el la ombroteatro "Pilgrimado al la Okcidento"



Dio de la ĉielo

Maljuna generalo





Por koni ĉinajn entreprenojn  
Por elekti idealajn kompanojn



**Por eviti erarojn en decidoj**  
**Por gajni altan profiton de investo**

## ABONU

### **“Ekonomiaj Informoj de Grandaj kaj Mezgrandaj Industriaj Entreprenej de Ĉinio”**

La ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio konigos en la nomita libro la ĉefajn statojn, produktaĵojn, sep grandajn ekonomiajn kaj teknikajn normojn, adresojn kaj bankkontojn de 1 000 grandaj kaj mezgrandaj industriaj entreprenoj elektitaj en la tuta lando. La libro donos informojn pri ĉiuj industriaj kampoj kaj estas kompilita laŭ la klasifiko de 53 industriaj kampoj. En la libro legiĝos plej aŭtoritataj, plej reprezentaj kaj plej novaj informoj. Ĉiujare ĝi donos novajn datenojn al la abonantoj. Ĝi servos kiel orientilo por koni Ĉinion kaj kunlabori kun ties entreprenoj. La libro, en la ĉina kaj angla lingvoj, estas liverita kun du altdensecaj diskoj kaj unu bindita presaĵo. Ĝi estas uzata kune kun personaj komputiloj.

La libro estas kompilita sole de la Disvolva Kompanio de la Shenzhen-a Speciala Ekonomia Distrikto kaj distribuata en- kaj eksterlande.

Prezo: 125.00 usonaj dolaroj por unu serio (ne inkluzive de sendkosto por neaziaj landoj)

Banko: Haifengyuan-ofice, Shenzhen Branch, People's Construction Bank of China.

Abonu ĉe la disvolva Kompanio de la Shenzhen-a Speciala Ekonomia Distrikto de Ĉinio (Shenzhen Special Economic Zone Development Company of China).

La kontnumero: E-45012201002009  
Konsultu la redakcion de “El Popola Ĉinio” aŭ kontaktigu rekte kun s-ro Du Shouhe de la Shenzhen-a Esperanto-Asocio, Ĉinio.

# Ĉigong-terapio kontraŭ koronaria kormalsano

(Daŭrigo)

de GAO HUARONG kaj YU YAN

II. Frapeto de la brusto kaj dorso

Prepara teniĝo:

Staru rekte kun la piedoj disetenditaj je la distanco longa kiel ŝultrolarĝo, brakoj nature pendantaj malsupren kaj okuloj rigardantaj rekte antaŭen.

Movoj:

Malstreĉu la korpon kaj turnu vin iom maldekstren kun la talio kiel akso. Frapetu la maldekstran parton de la brusto per la dekstra polmo kaj samtempe per la maldekstra mandorso frapetu la mal-

dekstran, supran parton de la dorso, simetrian kun la frapetata parto de la brusto. Turnu vin iom dekstren kaj frapetu la maldekstran parton de la brusto per la maldekstra polmo, dum per la dekstra mandorso la maldekstran, supran parton de la dorso.

Atentigoj:

1. Kiam vi frapetas la bruston aŭ dorson, la fingroj devas esti disigitaj. Frapetu modere kaj elaste.
2. Ĉe la frapeto vi devas malstreĉi vin kaj esti bonhumora.
3. Elspiru ĉe la frapeto.

Ĉe la frapeto sentu la agrablecon pro facila sangocirkulado en la koro.

Frapetu 20 fojojn. Vi povas frapeti pli aŭ malpli multe laŭ via sanstato.

III. Spirado kun la manoj alte tenataj

Prepara teniĝo: Staru rekte kun la piedoj disetenditaj je la distanco longa kiel ŝultrolarĝo, brakoj nature pendantaj malsupren kaj okuloj rigardantaj rekte antaŭen.

Movoj:

Dum la enspirado imagu al vi, ke io levas vin, tenante vin je la kapo. Streĉu la anuson kaj turnu la brakojn eksteren. Malrapide levu la manojn supren de la korpo flankoj ĝis la alteco de la ŝultroj. Dum la elspirado tenu la dekstran brakon senmove, faru per la maldekstra arkon supre kaj dekstre de la korpo kaj turnu la supran parton de la korpo iom dekstren. Per la maldekstra brako faru arkon de dekstre malsupren kaj maldekstren, malstreĉu la ventron kaj anuson. Remetu la maldekstran manon ĝis horizontaleco. Kaŭriĝu, kiam vi faras arkon per la maldekstra brako kaj elspiras. Kaj reprenu la originalan pozon, kiam vi remetas la maldekstran brakon ĝis horizontaleco. Faru la ekzercadon ripetfoje. Enspirante, turnu la atenton al la akupunktura punkto *baihui* (centre de la verto) kaj stariĝu. Elspirante, tenu la maldekstran brakon senmove, levu la dekstran kaj faru arkon supre kaj maldekstre de la korpo.


Atentigoj:

1. Enspiru, kiam vi rektigas la gambojn. Elspiru, kiam vi faras arkon per brako.
2. La spirado devas esti harmonia kun la ŝanĝiĝo de la pozoj.


Fiksu vian atenton sur la akupunktura punkto *mingmen*, kiu troviĝas ĝuste ĉe la parto de la talio malantaŭ la umbiliko.

Faru tion 4-8 fojojn. Ĉiu fojo konsistas el dekstra kaj maldekstra turniĝoj. Vi povas fari tion laŭ via sanstato. ■

Frapeto de la brusto kaj dorso




Spirado kun la manoj alte tenataj






# La antikva porcelana urbeto Shenhou

Fotoj de LING YOUJUAN



Antaŭ butikoj de Jun-porcelanaĵoj



Porcelana vazo

Jun-porcelanaĵoj: Anserkola vazo; vinujo kun cervokapa ornamo; vazo kun tigrokapa ornamo; kaj bovlo





Por baki porcelanaĵojn



Antikva konstruaĵo de la urbeto

Legendo diras, ke la urbo Yuzhou meze de Henan-provinco estas loko, kie klanestro de la antikva Ĉinio Dayu bridis inundon. Ĝi estis ankaŭ la ĉefurbo de Xia, la unua ĉina dinastio de sklava sistemo. Kaj la urbeto Shenhou, produkto de Jun-porcelanaĵoj famaj en Ĉinio, situas en montaro sudokcidente de Yuzhou.

Ekde la posta periodo de Tang-dinastio disvolviĝis la porcelana industrio kun produktado de Jun-porcelanaĵoj kiel la ĉefaj. Ĝi plej prosperis en Song-dinastio (960-1279). Tiam ĉiuj porcelanaĵoj estis tributitaj al la imperiestra palaco. En la lastaj jaroj de la Norda Song-dinastio (960-1127) ofte okazis militoj kaj la ĉefurbo translokiĝis suden. Tiam oni ne produktis Jun-porcelanaĵojn. En la suda Song-dinastio (1127-1279) multe leviĝis la prezo de Jun-porcelanaĵoj kaj estis diro, ke unu Jun-porcelanaĵo valoras eĉ pli ol la tuta havaĵo de familio. En Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) la produktado de Jun-porcelanaĵoj jen prosperis jen malprosperis. Kaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la produktado disvolviĝis senĉese.

Nun en la urbeto troviĝas 196 grandaj kaj malgrandaj bakaĵoj de Jun-porcelanaĵoj kun 7 000 bakistoj. La porcelanaĵoj vehdiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj 97 landoj kaj regionoj. 80% de la loĝantoj okupiĝas pri produktado kaj vendado de porcelanaĵoj. Ambaŭflanke de 3 ĉefaj stratoj de la urbeto funkcias pli ol 200 butikoj de porcelanaĵoj, kiuj staras unu apud alia. Krom lokaj porcelanaĵoj, ili vendas ankaŭ porcelanaĵojn de aliaj lokoj de Ĉinio. Nun la urbeto fariĝis staplejo de porcelanaĵoj de la lando.



# La nova medikamento

## *Fuzhengdangxie*

de LIU ZHIDA

**I**U pli-ol-60-jara maljunulo estis atakita de kor-pulma malsano kaj post nelonge tutkorpe infektiĝis. Lia imuneco malfortiĝis kaj li suferis de kor-pulma prostracio. Li prenis multe da importitaj medikamentoj en hospitalo, sed lia malsano neniom mildiĝis. Kiam li estis en mortdanĝero, kuracisto de iu malgranda kliniko alportis al li pocijon *Fuzhengdangxie*. Dank' al la pocio la maljunulo sin liberigis el la krizo post 10 tagoj kaj tute resaniĝis post unu monato.

La kuracisto estis Li Jiansheng, kiu laboras en la Wukesong-a Ĉin-medicina Ambulatorio de Haidian-distrikto, Pekino. La pocio *Fuzhengdangxie* estas frukto akirita de li en la pli-ol-dek-jara esplorado pri medikamento el freŝaj substancoj de bestoj.

Antaŭ nelonge mi intervjuis Li Jiansheng. Li, pli-ol-50-jara, estas fervora kaj serena. Pro konsultiĝo al multaj pacientoj li akceptis min nur en la tempo de manĝado. Li diris, ke li naskiĝis en familio de ĉin-medicinaj kuracistoj. Influate de sia patro, li ekokupis sin pri ĉin-medicinaj aferoj jam en la 18-jaraĝo. Li legis multajn klasikajn medicinajn librojn. En 1978 li eklernis en la ĉin-medicina esplorist-studenta kurso okazigita de la Ĉin-medicina Instituto de Ĉinio. Dank' al la 2-jara studo li ne nur multe levis sian kuracarton, sed ankaŭ amikiĝis kun pluraj famaj ĉin-medicinaj kuracistoj. Ĝuste inspirate de tiuj famuloj, li komencis esplori preparadon de medikamentoj el freŝaj substancoj

de bestoj.

En la pasintaj jarmiloj oni ĉiam preparis medikamentojn el bestaj substancoj per dekoktado kaj bakado, kio sendube detruis la aktivajn substancojn. Aktivaj enzimoj kaj peptido estas tre gravaj por la homa imuneco kaj ŝlosilaj por la medikamenta efiko. la antikvuloj dekoktis kaj bakis la bestajn substancojn, ĉar ili ne sciis, kiel teni la substancojn freŝaj, sed la modernaj sciencoj kaj teknikoj ebligis tion fari.

Por eksperimentado, en tago Li Jiansheng eliris kapti venenajn serpentojn spite la danĝeron kaj en nokto skorpiojn kaj gekojn. Somere li kaptis bufojn en lago. En lia hejmo estas pluraj korboj da tiaj bestoj, al kiuj neniu el liaj familianoj kuraĝas alproksimiĝi. Li sola prilaboris ilin. Ĉiujn dimanĉojn kaj festotagojn li pasigis en la eksperimentado. Helpate de medikament-esploraj institutoj kaj gvidate de veteranaj ĉin-medicinaj kuracistoj Li Jiansheng en 1988 finfine elfaris pocion *Fuzhengdangxie* per frostigo.

La eksperimentado montris, ke la pocio entenas mikroelementojn, aktivajn substancojn kaj 8 specojn da aminoacidoj, kies kvanto estas 3-4-oble kaj eĉ 9-oble egala al tiu de la sekaj tradiciaj medicinaĵoj. La pocio estas malgranda en la molekula pezo, facile asimilebla, rapidefika, senvenena kaj kun neniom da malbona efiko. Ĝi estas bonefika por kuraci sisteman eriteman lupuson, imunecan reduktiĝon kaj aliajn malfacile kuraceblajn malsanojn. Estas aparte rimarkinde,

ke ĝi havas bonan efikon en la kuracado de malignaj tumoroj.

Pli-ol-50-jara virino trovis malmolan tumoron en grandeco de fabo ĉe la dekstra mammo en 1987 kaj en la sekvinta jaro la tumoroj fariĝis granda kiel nukso. Hospitalo diagnozis, ke tio estas mama kancero kaj detranĉis al ŝi la mammon. Nelonge post la operacio oni trovis, ke ĉe ŝi la kanceraj ĉeloj disiĝis kaj faris al ŝi ektomion de la utero kaj ĝiaj apendicoj. 10 tagojn post la operacio sur la operaciita loko la haŭto putriĝis kaj ŝveliĝis la limfonodo sur ŝia maldekstra klaviklo. Evidente graviĝis ŝia malsano. Ŝiaj familianoj alportis ŝin al Li Jiansheng. D-ro Li kuracis ŝin per la pocio *Fuzhengdangxie* ĉiutage. Post unu monato ŝia lezita loko resaniĝis kaj ŝi ekhavis apetiton, malgrandiĝis la limfonodo sur ŝia maldekstra klaviklo. Post 6 monatoj ŝi eklaboris sur la kampo kaj nun estas sana kaj vigla.

84-jara maljunulino Li estis atakita de ezofaga kaj stomaka kancero en 1989. Pro la grandaĝo oni ne povis fari al ŝi operacion. Ŝi multe suferis de manĝado. Ŝia filo diris al Li Jiansheng: "Bonvolu mildigi la malsanon de mia patri-no! Se ŝi vivus plu 3 monatojn, mi do alportus ŝin al mia hejmloko Nankino, kiam la tagoj iom malvarmiĝos." Li Jiansheng donis al ŝi la pocion. Post duonmonato venis al ŝi apetito kaj ŝi povis manĝi kaĉon kaj aliajn ordinarajn manĝaĵojn. Ŝi daŭre prenis la medikamenton kaj finfine resaniĝis.

Oni faris enketon pri 197 kazoj de malfruaj malignaj tumoroj kaj



Li Jiansheng kaj pacientoj

trovis, ke la pocio *Fuzhengdangxie* bonefikis sur 189 kazojn.

La 13-an de septembro 1990, la Tutlanda Ĉin-medicina Instituto de Ĉinio okazigis simpozion pri la praktika efiko de la pocio *Fuzhengdangxie* el freŝaj substancoj de bestoj. La simpozion ĉeestis pli ol 30 fakuloj. La ĉeestantoj konfirmis la efikon de la pocio en kuracado de kancero kaj opiniis, ke Li Jiansheng faris fruktodonan esploron pri la medikamento el freŝaj substancoj de bestoj kaj ĝia efiko estas aŭtentika kaj konvinka. Fakuloj diris, ke en kuracado de kanceraj ĉu kemiterapio ĉu radioterapio ĉu ektomio ĉio kaŭzas traŭmaton al la korpo de la malsanulo kaj iam eĉ gravan. La pocio estas kaj tonika kaj kuraca. Ĝi estas utila por apetito, plifortiĝo kaj malgrandigo de kancero, mildigo de doloro kaj malgravigo de simptomoj.

Ĉe la fino de mia vizito d-ro Li diris al mi, ke venki malignajn tumorojn estas la komuna deziro de la tuta homaro kaj li volonte batalas en la tuta vivo por la idealo. Nun la pocio *Fuzhengdangxie* es-

tas alte taksata de la medicinistaj rondoj ĉina kaj eksterlanda. Fakuloj kaj profesoroj de la Ĉin-medicina Instituto de Ĉinio, Bioingeneria Fakultato de Qinghua-Universitato, Pekina Medicina Universitato kaj Medikamenta Instituto de Pekino kunlaboras kun Li Jiansheng en esploro pri la medikamentoj el freŝaj substancoj de bestoj.

Li Jiansheng diris: "Medikamentoj el bestaj substancoj estas trezoro de la ĉinaj medikamentoj. Ni certe akiros grandajn sukcesojn, aplikante medikamentojn el freŝaj substancoj de bestoj en kuracado de kanceraj."

#### Solvoj de interesaj demandoj

1. En la aŭtobuso estis nur mi, ŝoforo kaj konduktoro.
2. Mapo
3. "Ĉu vi endormiĝis?"
4. Ili ambaŭ ne ŝvitas, ĉar la hundoj ne havas ŝvitglandon.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Fu Guoqing, filatelisto, dez. kor. tm. Mi havas liston de kolektaĵoj por interŝanĝo kaj povos senpage sendi ĝin al vi. Skribu al: Dianjichang, Shichejian, 150040, Harbin, Heilongjiang, Ĉinio.

\* Yan Deting dez. kor. kun ĉiulandaj geesperantistoj kaj interŝ. pm. kaj bk. Adr.: Lingling Juanyanchang, Yongzhou, Hunan, 425000 Ĉinio.

\* Ruben Diaconu, 38-j. dez. kor. tm., kolektas bk. Adr.: Jugoslavia Esperanto, 3700-Saenz Pena, Chaco-Argentino.

\* Dez. kor. tm. por interŝanĝo de didaktika materialo kaj eksperimento pri instruado de Esperanto al geinfanoj. Ana Rocha, R. Uraque 210, BR - 21720 - Rio - Brazilo.

\* Kastora Klubo estas Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco, al kiu apartenas infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj el 60 landoj. La Klubo helpas trovi korespondamikojn en aliaj landoj — sufiĉas sendi al la klubo informojn pri la familia kaj persona nomoj, naskiĝdato, sekso kaj interesiĝoj. Kastora Klubo sendas senpage sian bultenon al la Esperanto-instruantoj, kiuj kunlaboras kun la klubo (la bulteno enhavas informojn pri la klubo vivo kaj ankaŭ facilajn legaĵojn, versajetojn, kanzonojn, uzatajn de multaj instruantoj kiel helpiloj dum la laboro). Pluajn informojn petu ĉe: Kastora Klubo, ul. Pulawska 3-11, 02-515 Varsovio, Pollando.



### EKONOMIO


La Unua Dekjara Plano por Disvolvi la Tibetan Ekonomion aprobita en la Kvara Sesio de la Kvina Popola Kongreso de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, kiu fermiĝis antaŭ nelonge, difinas, ke en la jaro 2000 la totala valoro de la nacia produktado, la nacia enspezo kaj la totala valoro de la industria kaj agrikultura produktado de Tibeto kreskos de 2 217, 1 742 kaj 1 024 milionoj da juanoj en 1990 al 3 900, 2 960 kaj 1 780 milionoj da juanoj respektive, t.e., la jaraj meznombrakreskoj estos 5.8%, 5.4% kaj 5.7% respektive. La Unua Dekjara Plano por Disvolvi la Tibetan Ekonomion markas la grandpaŝan iradon de Tibeto al la 21-a jarcento.

Je la 6-a de junio fondiĝis en Pekino la Elektronik-Industria Kompanio de Ĉinio, la plej granda ekonomia entrepreno de la ĉina elektronika industrio.

La kompanio estas granda ŝtata entrepreno, kiu havas plurajn funkciojn, kiel ekspluatado, produktado kaj vendado de altteknikaj elektronikaj produktaĵoj, inĝenieria servo kaj investado por entreprenoj. Ĝi havas sciencojn, teknikojn, edukon, industrian administron, financon kaj komercon kiel unu tuton kaj plenumas taskojn speciale difinitajn de la ŝtato.

La fondiĝo de EIKĈ estas grava paŝo de la elektronika industrio de Ĉinio en la struktura regulado. La celo por la fondiĝo estas koncentri nombron da elektronikaj entreprenoj por plenumi gravajn taskojn de la ŝtato kaj ludi ŝlosilan rolon en la disvolviĝo de la elektronika industrio kaj moderniga konstruado de Ĉinio.

Altforno n-ro 2 post riparado



Post 55-taga riparado kaj rekonstruado la altforno n-ro 2 de la Ĉefurba Ŝtala Kompanio, konstruita en 1943, estis rehejtita en la 18-a de majo 1991.

La forno estas reformita per avangardaj teknikoj kreitaj de la kompanio kaj ankaŭ per novaj teknikoj en- kaj eksterlandaj, tiel ke la forno atingis la monde avangardan nivelon en afinacio, meĥanismo, aŭtomacio, longigo de uzado, medio-protekto kaj ŝparo de energio. Oni pligrandigis la efektivan volumenon de la forno de 1 327 al 1 726 kubmetroj sen plialtigi la fornon, ke ĝi produktas almenaŭ 5 000 tunojn da fero ĉiutage.

De la pasinta jaro la Fervoja Ministerio de Ĉinio rekonstruas la Kanton-Shenzhen-an Fervojon en fervojon por rapideco de 160 km/h. Tio metis bazon por konstrui rapidan fervojon en Ĉinio.

La minimuma rapideco de rapida fervojo, sankciita internacie, estas 200 km/h. Konsidere al siaj naturaj riĉfontoj, loĝantaro kaj ekonomiaj fortoj, Ĉinio planas finkonstrui la Pekin-Ŝanhajan Fervojon kun rapideco de 200 km/h en la jaro 2000.

La Ĉina Popola Banko oficiale konsentis fondi en Ŝanhajo filiojn de la mondfamaj bankoj, kiaj la Unua Nacia Urba Banko, Banko de Ameriko, Socio Ĝenerala, Sanwa Banko, Kredito Liona kaj Banko de Hindoĉinio. La supre menciitaj bankoj ekonomie havas intiman rilaton kun Ŝanhajo kaj kontribuis al ĝi per liverado de informoj, trejnado de talentuloj kaj konsultiĝa servo.

La plej granda, plej moderna kaj plej bone ekipita subtera strato de Ĉinio estis inaŭgurita en Shenyang.

La strato situas sub la placo antaŭ la nove konstruita Norda Stacidomo de Shenyang, kun areo de 45 000 kvadrataj metroj kaj alto de 3.2 m. Ĝi konsistas el du partoj, inkluzive de magazeno, manĝaj-vendejo, amuzejo kaj garaĝo.

En 1990 Ĉinio produktis 28.57 milionojn da tunoj da viando, kio faris Ĉinion la plej granda lando de vianda produktado de la mondo.

Antaŭe Ĉinio produktis viandon sur kompare malalta nivelo. En la lastaj dek jaroj la ĉina registaro nuligis iujn politikojn malfavorajn al porkobredado kaj paŝo post paŝo reguligis aĉet-vendan prezaron, kio multe kuraĝigis porkobredantojn. Krome, Ĉinio akiris rimarkindan sukceson ankaŭ en kulturado de bonaj specioj, mikrado de nutraĵoj, scienca bredado k.a. Dank' al tio, la

vianda produktado disvolviĝas stabile, kontinue kaj rapide.

- La Ŝanhaja Biloborso, la unua sur la ĉina kontinento, estis inaŭgurita. La biloborso estas de strukturo de administra jura persono kaj praktikas membran sistemon. La membroj de la biloborso estas profesiaj agentoj, profesiaj komercistoj, plurfunkciaj agentoj kaj memadministrataj komercistoj. La ĉefa tasko de la borso estas aranĝi bilojn por la merkato, liveri negocejon, doni servon al likvido, transdoni akciojn kaj informojn pri bilomerkato. La biloborso faras ĉefe kontantan negocon kaj ankaŭ la akcian. Estonte ĝi iom post iom sin turnos al akcia kaj obligacia negocoj.

- En 1990 ĉiu kamparano de la Ŝenzhen-a Speciala Distrikto en suda Ĉinio enspezis meznombro 1 950 juanojn, kiuj jam superis la meznombro enspezon (1 640 juanoj) de la antaŭurbaj kamparanoj de Ŝanhajo kun la plej alta enspezo en la lando. La meznombra enspezo de la Ŝenzhen-aj kamparanoj kreskis je pli ol 20% kompare kun tiu de 1989, kaj estis la plej granda tiaspeca kresko de Ŝenzhen en la lastaj dek jaroj. Fakuloj montris, ke la vivnivelo de la Ŝenzhen-aj kamparanoj jam proksimiĝas al la normo difinita de la ŝtato por la tutlandaj kamparanoj en la fino de la kuranta jarcento.

- Ĉinio estas unu el la kvin landoj, kiuj ekspluatas novan vestan materialon "kosma vato". Tial la vintraj vestoj de ĉinoj fariĝas leĝeraj kaj havos elegantan formon.

La nomo "kosma vato" estas ricevita pro tio, ke usonaj kosmonaŭtoj la unuaj portis veston el tiaspeca materialo. Ĝi konsistas el elasta vato, senteksa tolo, tegaĵo el aluminititana alojo. La tegaĵo reflektas la varmon dissenditan de la homa korpo, tiel ke la "kosma vato" havas plej altan varmokonservan kvaliton kompare kun aliaj sampezaj materialoj. Krome, ĝi estas ankaŭ leĝera, maldika, supla, aeralasa, humidimuna k.a.

- Oni trovis, ke la Aŭtonoma Subprovinco de Okcidenta Hubei estas regiono riĉa je seleno, malofte vidata en la mondo. Seleno estas unu el la dek kvar mikroelementoj nemankigeblaj por la homa korpo. La malkovro vekis grandan intereson de eksterlandaj specialistoj.

### SPORTO

- La Ĉina Fizikkultura kaj Sporta Asocio de Studentoj oficiale donis al la Monda Fizikkultura kaj Sporta Federacio de Studentoj sian peticion pri la okazigo de la 19-a Monda Somera Studenta Sportkunveno en 1997 en Ŝanhajo. La monda studenta

sportkunveno estas ampleksa sportkunveno, kiu okazas en ĉiu dua jaro. En 1959 estis okazigita en Italio la unua tia sportkunveno, kaj nun estis okazigita la 15-a.

En la mezo de septembro la Internacia Festivalo de Shaolin-uŝuo estos okazigita en Zhengzhou, Ĉinio. En ĝi partoprenos uŝuistoj kaj uŝuaj grupoj el Japanio, Malajzio, Singapuro, Hongkong, Usono, Kanado, Italio kaj aliaj landoj kaj regionoj.


De la pasintaj jaroj la homoj, kiuj sin ekzercas per Shaolin-uŝuo, troviĝas ĉie en la mondo. La okazigo de la festivalo celas akceli la interŝanĝon de spertoj inter la ĉinaj kaj alilandaj uŝuistoj kaj ankaŭ turismajn kaj ekonomiajn aktivadojn.

### KULTURO

- La 7-an de junio oni okazigis la premieron de la filmo "Mao Zedong kaj Lia Filo" produktita de Xiaoxiang-studio de Hunan-provinco. La filmo estis laŭdata de rigardantoj de Pekino. Ĝi reliefigas la amon de Mao Zedong al siaj edzino, gefiloj, kunbatalantoj kaj ankaŭ al popolamasoj.

- La silka ventumilo "Ĉarmo de la Lando" estis farita en Hangzhou. Ĝi, la plej granda en la mondo, altas je 2.6 m kaj larĝas je 5 m. Ĝi surhavas poemon, kaligrafiaĵon, pentraĵon, sigelon kaj lignan skulptaĵon. Sur ĝi prezentiĝas kuve grandaj peonioj rozkoloraj, helverdaj kaj flavetaj, kiuj tre ĉarmas inter tuĉpentritaj helaj folioj. Sur la flankaj lignaj framoj kun alto de 2 m estas skulptitaj dek famaj pejzaĝoj de la Okcidenta Lago.

La grandega silka ventumilo





# Pensado pri tondro kaj kritiko kontraŭ sanktulo

de HOU JUELIANG

**H**ISTORIA libro diras, ke la elstara materiisma filozofo Wang Chong (27-97 p.K.) estis ŝatata en la infaneco. Li estis lernema kaj ĝentila, ke li estis neniam batita kaj riproĉita de siaj gepatroj. Pro malriĉeco li ne povis aĉeti librojn, kaj li ofte legis en librovendejo. Li, multescia, tre interesigis pri strangaj vortoj. Lin karakterizas jenaj vortoj: “Kun elstara talento li ne verkis facilanime. Kun elokventeco li ne emis disputi kun aliaj kaj eĉ unu vorton li ne diris al homo ne intima al li.” Li ignoris profiton kaj altan oficon. “Li ne ĝojis pro enoficiĝo, nek bedaŭris deoficiĝon.” Lia intereso kuŝis en verkado. Li instruis en vilaĝo kaj havis multe da lernantoj. Li multe verkis. Bedaŭrinde, plejparto el liaj verkoj perdiĝis kaj restis nur la libro “Pri Mezuro” el 48 artikoloj kun pli ol 200 000 ideogramoj.

En la tempo, kiam vivis Wang Chong, filozofio degeneriĝis. Miksigis superstiĉo, teologio kaj filozofio. Homoj fariĝis malkleraj kaj kroĉis superstiĉaĵojn al normalaj naturaj fenomenoj anstataŭ serĉi sciencon klarigon.

Tiam, oni eĉ ege miris pri la natura fenomeno, kia tondro, kaj faris absurdajn interpretojn. Iuj diris, ke la ĉielo eksplodas de kolerego, aliaj asertis, ke la tera dio sin turnas dormante.



Portreto de Wang Chong

Wang Chong refutis: “Oni verŝas koleron en iu direkto, sed ne en ĉiuj direktoj. Se la ĉielo vere koleras, ankaŭ ĝi devus verŝi koleron en iu direkto same kiel homo. Tamen tondro bruas ne en iu direkto, sed en ĉiuj direktoj. Oni do ne devas diri senkaŭze, ke la ĉielo koleras. Kaj tia diro estas nenio alia ol absurdo.” Wang Chong diris ankaŭ, ke se ekzistus la tiel nomata tera dio, ĝi vivus sub niaj piedoj, ni do devus senti teran skuon dum ĝia turniĝo. Tamen kiam tondras, ni aŭdas nur bruon super la kapo kaj ne sentas skuon sub la piedoj. Ĉu oni povus diri, ke la turniĝo de la tera dio kaŭzas tondron? Surbaze de ĝenerala scio de homoj Wang Chong facile paligis la absurdajn vortojn pri tondro.

Kaj plie, li klopodis por fari sciencon interpreton pri naturaj fenomenoj. Kio estas tondro? Li

klarigis: “Tondro estas fajro. Vidu, la hararo de tondrobatito forbrulis, la haŭto karbiĝis kaj la tuta korpo odoris je brulaĵo. Nun ni vidu tondroatakitajn domojn kaj arbojn! Ili brulas.” Wang Chong donis plua-paŝan klarigon, ke tondro okazas pro la interfrapiĝo de *jin*-a *ĉi*-o kaj *jang*-a *ĉi*-o sur la ĉielo (ni komparu ilin kun negativa elektro kaj pozitiva elektro), kaj la interfrapiĝo estigas fajron kaj sonon, same kiel arda ŝtono subite ĵetiĝas en frostan akvoputon. La klarigo de Wang Chong estis scienca. Li faris sciencon esploradon pri diversaj naturaj fenomenoj, el kio li faris ĝustan konkludon laŭ materiisma metodo, ne kiel teologoj, kiuj faris absurdaĵojn pri tiaj fenomenoj.

Li ĝuste klarigis ne nur tondron, sed ankaŭ nubon, pluvon, prujnon, roson kaj aliajn naturajn fenomenojn. Iuj diris, ke pluvo falas de la ĉielo kaj estas donaco de la ĉielo. Sed Wang Chong neis. “Pluvo devenas ne de la ĉielo, sed de la tero. Vaporo, kiu leviĝas de la tero, kondensiĝas en nubon. Nubo fariĝas pluvo kaj vintre neĝo. Ankaŭ prujno kaj roso sur la tero ne falas de la ĉielo, ili formiĝas el kondensiĝinta vaporo. Nenia natura fenomeno koncernas la personigitan dion de la ĉielo.” Teologoj diris, ke vento, pluvo, tondro, fulmo, prujno, neĝo, nuboj, printempo, somero, aŭtuno, vintro, beno kaj plago prezentas ĝojon kaj malĝojon de la ĉielo. Kiam ĝi ĝo-

jas, ĝi donas benon; kiam ĝi koleras, ĝi plagas. Surbaze de materiisma analizo, Wang Chong refutis la absurdaĵojn pri la ĉielo kaj naturaj fenomenoj. Li diris, ke la ĉielo kaj la homo ne povas respondi unu al la alia. Teologoj tiris homojn en ideisman abismon. Kiam okazis sekeco, oni preĝis por pluvo; antaŭ vojaĝo oni petis profetaĵojn de dio; kaj en malfeliĉo oni genuis al la ĉielo por beno. Laŭ Wang Chong, ĉio ĉi estis ridinda stultaĵo kaŭzita de fantazio de malsaĝuloj. Li prave montris: “En kaduka epoko oni emas kredi je dio, kaj malsaĝuloj ofte preĝas por feliĉo.”

Teologoj opiniis, ke la ĉielo estas kapabla. La ĉielo por ia celo kreas homojn kaj aliajn estaĵojn, kaj servigas la lastajn al la homoj, ekzemple grenon kiel manĝaĵon, silkon kaj kanabon kiel vestojn. Tamen, Wang Chong opiniis, ke la ĉielo estas nekapabla. “La ĉielo kaj tero kunigas sian ĉi-on, kaj sekve ĉiuj estaĵoj naskiĝas nature”, same kiel geedzoj kuniĝas, kaj naskiĝas infano. Ĉu la ĉielo havus sennombrajn manojn, se ĝi devus persone krei ĉiujn estaĵojn? Estas nature, ke la ĉielo kreas ĉiujn estaĵojn, kaj ankaŭ nature, ke la homoj serĉas manĝaĵon el la naturo. Malsata, oni serĉas manĝon. Ĉu tio koncerne la ĉielon? Sentante malvarmon, oni serĉas veston. Ĉu tio iel rilatas al la ĉielo? Herboj ĝermas printempe, kreskas somere, flavas aŭtune kaj velkas vintre. Tio estas tute natura, ekster ia ajn “ago” de la ĉielo. La plago venas ne el la ĉielo, kiu scipovas nek paroli, nek puni homojn.

Ĉu la homo estas “kapabla”? Wang Chong diris: “La homo estas kapabla.” Ekzemple, printempa plugo, somera kulturado, aŭtuna rikolto kaj vintra konservo ja estas faroj de la homo, kiu laboras kaj transformas la medion laŭvole kaj laŭcele.” La teorio, ke “la homo estas kapabla”, rekonas la subjektivan iniciatemon de la homo, kiu kreas sian feliĉon laŭ subjektiva leĝo. Tiele, Wang Chong ĝuste klarigis la rilaton inter “la ĉielo estas nekapabla” kaj “la homo estas ka-

pabla”.

Rilate al konado, Wang Chong neis la teorion pri “denaska genio”, kaj elmetis sian materiisman konadon. En la tempo de Wang Chong iuj vulgaraj konfuceanoj propagandis la ideisman teorion pri “denaska genio”, diigis sanktulojn, dirante, ke ili estas senkompare saĝaj denaske, scias kaj komprenas ĉion sen lerno, kaj eĉ konas la aferojn okazintajn “en la pasintaj mil jaroj” kaj okazontajn “en la venontaj dekmil jaroj”. Ili diris, ke la patrino de Konfuceo (551-479 a.K.) neniam diris al li, kiu estas lia patro, tamen foje Konfuceo sin amuzis per flutludo, li subite konsciis, ke lia praulo estas posteulo de la reĝa familio de Shang-dinastio (ĉ. 1711-1066 a.K.). Ili volis pruvi per tio, ke Konfuceo sciis la aferojn okazintajn “en la pasintaj mil jaroj”. Ili diris ankaŭ, ke sanktulo Konfuceo profetis antaŭ sia morto, ke post lia morto aperos la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiu vizitos lian hejmlokon kaj mortos sur la revena vojo, ĉe la loko Shaqiu. Post lia morto efektive aperis la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiu unuigis Ĉinion kaj mortis ĉe Shaqiu. Per tio vulgaraj konfuceanoj asertis, ke sanktuloj povas scii la aferojn okazintajn en “venontaj dekmil jaroj”. Wang Chong opiniis, ke tiuj legendoj de vulgaraj konfuceanoj estas senbazaj kaj trompaj.

Por forigi la blindan kredon al Konfuceo, Wang Chong speciale verkis la artikolon “Demandi Konfuceon”. En la tempo de Wang Chong la pozicio de Konfuceo estis absolute alta. Oni povis nur lin kulti, sed neniom mallaŭdi, ĉar kritiki Konfuceon signifis kritiki sanktulon kaj damninde herezi. Tiam ordinara kleruloj distingis pravon disde malpravo nur laŭ la kriterioj de Konfuceo. Ili kuraĝis diri nur tion, kion diris Konfuceo. Wang Chong opiniis, ke tio estas ege nenormala fenomeno, oni ne devas blinde fidi al la sanktulo, sed anstataŭe, “demandi” kaj “kritiki” Konfuceon. Li montris, ke ne ĉiu vorto el “Analekto de Konfuceo”

estas ĝusta kaj en ĝi ne mankas eraroj kaj kontraŭdiroj. Konfuceo diris: “Oni deziras riĉaĵojn kaj altan oficon, tamen oni ne devas akiri ilin maljuste. Oni ne ŝatas malriĉecon kaj malnoblecon, tamen oni ne devas eviti ilin, se ili ne estas akiritaj juste.” Wang Chong opiniis, ke la unua frazo estas ĝusta, kaj la dua erara. Kion signifas akiri malriĉecon kaj malnoblecon? Ĉu tio estas logika? Wang Chong plendis, ke la tiel malĝusta diro eĉ cirkulas de multaj jaroj, kiel sanktaĵo. Laŭ Wang Chong, sanktulo ne estas dio, sed homo, kiu estas granda, sed faras erarojn.

La konado de Wang Chong havas du trajtojn: Unue, li emfazis la rolon de sensorganoj, kaj due, la rolon de pensado. Wang Chong opiniis, ke oni tute ne povas koni aferojn, cerbumante tagnokte en ĉambro, sen rigardi kaj aŭskulti. Por koni aferojn oni devas streĉi la sensorganojn, precipe la orelojn kaj okulojn. Li diris, ke nur per la oreloj kaj okuloj oni povas konfirmi la verecon de aferoj. Kaj post serioza pripenso kaj analizo oni havas ĝustan konon pri aferoj. La konada procezo de Wang Chong — de senso al penso, iom similas al la hodiaŭa materiisma teorio de konado: de percepta kono al racionala kono. Wang Chong opiniis, ke sanktuloj, virtuloj aŭ ordinaruloj ne povas sin apartigi disde senso kaj pensado por koni aferojn. Se homoj, eĉ stultaj, bone observas kaj pripensas, ili povas koni aferojn en la mondo. Eĉ sanktuloj ne povas koni aferojn sen aŭskulti, rigardi kaj pensi.

Wang Chong estis filozofa iniciatema. De Xunzi li lernis materiisman, kaj de Laozi dialektikon, kaj poste starigis sian pli perfektan materiisman doktrinon. Rilate mondkoncepton, li opiniis, ke “la ĉielo estas nekapabla” kaj “la homo estas kapabla”, ke ĉiuj estaĵoj estas kreitaj de “ĉi-o”, sed ne de la ĉielo. Koncerne la korpon kaj spiriton de la homo, li opiniis, ke la spirito ne ekzistas plu, kiam la homa korpo ne havas senson. Per tio li neis la ekziston de fantomoj kaj dioj. Pri



## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizaĵoj kaj niaj peranĵoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Esperantista klubo ZK TESLA Pardubice - Ĉeĥoslovakio, aranĝos letervesperon la 30-an de oktobro 1991 kaj atendas salutojn el tuta mondo. Ĉiuj salutontoj ricevos koloran bildkarton de urbo Pardubice. Eble korespondi kun gelernantoj de 12-j. ĝis 70-j. Salutleterojn aŭ bondezirkartojn bonvolu adresi al klubano: Pavel Nechvíle, Fügnerova 233, 533 51 Pardubice-Rosice, Ĉeĥoslovakio.

\* Jacira Castanho, 38-j. sekretariino, dez. kor. kun geesperantistoj tm. Interesiĝas pri muziko, fotografado, popolkutimoj, bildkartoj, poŝtmarkoj kaj aliaj. Adr.: Caixa Postal 8054, Bonsucesso, 21042 Rio de Janeiro, Brazilo.

\* Universitato de la tria aĝo - Grupeto de emeritaj gekomencantoj dez. kor. kun simila alilanda grupo. Adr.: Colin Giles, 6176 Beach St, Grange Sa 5022, Aŭstralio.

\* Adelaide - Universitata E-klubeto de junaj gekomencantoj dez. kor. kun simila grupo en alilanda universitato. Adr.: Stephen Gregory, 13 Jackson Ave, Coromandel Valley Sa 5051, Aŭstralio.

\* Ruslan Mavljudov, 34-jara servisto pri civitana aviado, serĉas ĉinajn samideanojn, kiuj kompetentus pri akvariumado. Preferindas, por eblaj korespondantoj sciu nomojn de fiŝoj kaj akvobestoj latine. Adr.: USSR, 465 032 Kaz. SSR, g. Gurjev, 3-"A" mk-n, d.

1-A, kv. 56.

\* Elisei Daniela dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri literaturo, arto kaj teatro, interŝanĝi pm., kaj bk. Adr.: Str. Stefan cel Mare nr. 91, Loc Mizil cod 5025, Jud. Prahova, Rumanio.

\* Daiva Vegyte, 11-j. lernantino, dez. kor. tm. kaj kolektas poŝtmarkojn, glumarkojn, bildkartojn kaj kalendaretojn. Adr.: Str. Gelvonu 51-5, 232010 Vilnius, Litovio, USSR.

\* Ginta Pakalniškyte, 12-j. lernantino, dez. kor. tm., kolektas pm., glumarkojn kaj bildkartojn. Adr.: Akmenes rajonas, Klykoliur Paŝtas, 235464 Litovio, USSR.

\* Konovalov Nikolaj dez. kor. pri speleologio. Adr.: ul. Volokolamskaja 3/1 - 33, Rostov Don, SU-344064, USSR.

\* Atroŝenko Trofim, 13-j. knabo, dez. kor. pri filatelo, numismatiko, geografio, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, monerojn kaj papermonerojn. Adr.: ul. Dubrovinskogo 106-163, Krasnojarsk 660017, USSR-Siberio.

\* Fu Guoqing, filatelisto, dez. kor. tm. Mi havas liston de kolektaĵoj por interŝanĝo kaj povos senpage sendi ĝin al iu.

Skribu al: Dianjichang, Shichedian, 150040 Heilongjiang, Harbin, Ĉinio.

\* Jin Monglong, 24-j. instruisto pri uŝuo, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, precipe pri uŝuo, kaj interŝanĝi la gazeton uŝuo. Esperante, angle, koree aŭ ĉine. Adr.: 3 Wei 5 zu, Hepingjie, Dehui, Jilin, 130300, Ĉinio.

\* Mi dez. interŝanĝi opiniojn kaj vidpunktojn pri la aktuala situacio de la Internacia Komunisma

Movado Esperante, angle, france, ĉine. Liu Xiaozhe, the Xinjiang tea & Animal By-Products Corporation, 830002, Ĉinio.

\* Aloisio Sartorato, 14-j. fraŭlino, dez. kor. tm. Adr.: Angelica Sartorato, CP 62615, Cep 22257, Rio de Janeiro, Brazilo.

\* 37-j. italargentinano migrados por loĝadi laborserĉanta al sudokcidenta Eŭropo. J Tarducci, San Martin 1165, Ra 2600 Venado Tuerto, Argentino.

\* Bonichon Christine, 30-j. fraŭlino, dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: 5, rue Ludovic Trarieux, 24000-Perigueux, Francio.

\* Luiz Carlos Lemos, bankoficisto, 37-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Kolektas poŝtkartojn. Certe respondos. Adr.: C.P. 501 - Cep 35100 - Governador Valadares (MG) - Brazilo.

\* C Bold, 41-j. dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, interesiĝas pri fremdaj lingvoj, akupunkturo, astrologio kaj vojaĝo. Adr.: Ya-zu Asocio, Ulanbatoro 44, MPR.

\* Internacia Koresponda Klubo helpas al vi trovi korespondanton kaj reciprokan gastadon en Rumanio. Adr.: Lugoj 1800 Rumanio, Box 75. Albert Zsuzsa, 18-j. knabino, volas korespondi tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Albesti-Tirnava 3068, Telepes 12, Mures, Rumanio.

\* Unika en la tuta Esperantujo: speciala Esperanta Klaso por eduki geniulojn. Dek du ĉarmaj okjaraj infanoj, jam famaj pro siaj elstaraj atingoj en la lernado de lingvo kaj matematiko, deziras korespondi tutmonde. Adreso: Fondaĵo Talento, Budaors, pf. 102, H-2041, Hungario.

la teorio de konado li konfirmis, ke konado venas el senso kaj sperto, kaj oponis kontraŭ la ideisma opinio, ke oni povas scii sen lerno. Rilate la koncepton pri historio, li oponis kontraŭ la restaŭro de an-

tikvaĵo, asertante, ke la socio senĉese evoluas kaj lia epoko multe superas tiun antaŭ la Unua Imperiestro de Qin-dinastio. Tiuj filozofiaj ideoj de Wang Chong estis "perfidaj" en la okuloj de feŭdaj

regantoj siatempe, ke estis malfacile cirkuligi liajn verkojn. Tamen lia penso vaste disvastiĝis kaj havis grandan influon sur la disvolviĝon de la posta materiismo. ■

# Brila antikva kulturo de sterila lando

Teksto kaj fotoj de LI QIANG

**L**A Flava Rivero estas unu el la luliloj de la antikva ĉina kulturo. La kulturo de la Flava Rivero en centra Ĉinio estas vaste konata pro siaj abundaj antikvaj restaĵoj sur- kaj subteraj. La Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, kie troviĝas la fonto de la Flava Rivero, havas altan altitudon, malfacilan trafikon, malbonan klimaton kaj sterilan teron. Sed ekde la 20-a jarcento, precipe post 1949, kiam la Ĉina Popola Respubliko fondiĝis, ĉinaj arkeologoj faris grandan prifosadon kaj trovis multe da antikvaj kulturaj restaĵoj, kiuj elokvente montras, ke ambaŭborde de la Flava Rivero kaj en la baseno de ĝia branĉo Huangshui sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo ekzistas brila antikva kulturo de longa historio.

Kiam mi estis en Qinghai por intervjuo, lokano diris al mi, ke la tombejo de Liuwan norde de Huangshui-rivero en Ledu-gubernio estas unu el la plej grandaj kaj bone konservataj tombejoj de la primitiva socio en Ĉinio. Tio vekis mian grandan intereson, tial mi reviziis mian tagordon kaj faris vojaĝon al Liuwan.

Ni aŭte veturis orienten de Xining kaj post unu horo venis en la gubernian urbon Ledu. Post plia 10-kilometra veturado de ĝi ni atingis Liuwan-vilaĝon, kie situas la Kolor-ceramika Esplora Centro de Qinghai. Informiĝinte pri la intenco de mi kaj miaj kolegoj, s-ro Chen, estro de la centro, proponis al ni unue viziti la antikvan tombejon.

S-ro Chen estas arkeologo kaj partoprenis en la prifosado de la tombejo. Li gvidis nin al montdeklivo. Ascendinte altaĵon, li montris al mi nordan montdeklivon plenan de fositaj kavoj. Tio estas la antikva tombejo trovita en 1974. Arkeologoj prifosis 4 jarojn la deklivon kun areo de 112 500 kvadrataj metroj, trovis 1 500 tombojn de malsamaj kulturtipoj de la primitiva socio kaj elterigis 30 000 objektojn. Laŭ la kulturaj karakteroj oni povas klasifiki ilin en Banshan-tipon (2 500 a.K.) kaj Machang-tipon (2 000 a.K.) de Majiayao-kulturo (3 000-2 000 a.K.) kaj en tipon de Qijia-kulturo (2 000 a.K.), kun Machang-tipo kiel la ĉefa. La

kulturoj estis disvolviĝintaj el Yangshao-kulturo (5 000-3 000 a.K.).

La prifositaj antikvaj tomboj nun jam estis plenigitaj. En la esplora centro oni redonis la aspekton de kvar tipaj tomboj. S-ro Chen konigis al ni la strukturon de la tomboj. Ili plejparte estas teraj, vertikale fositaj kaj horizontale rektangulaj. Malmultaj el tiuj estas terkavernaj tomboj, kiuj vidiĝas T-forme horizontale. Tia tombo konsistas el enirejo kaj kelo. La kelo estas fermita per lignaj stangoj aŭ tabuloj. Ili estas la plej fruaj terkavernaj tomboj de Ĉinio. Ene estas ligna ĉerko trapeza aŭ rektangula kaj soltrunka. Estas unu-kuŝa tombo aŭ plur-kuŝa tombo. Oni trovis tombon eĉ kun sep kadavroj.

La manieroj de kun-entombigo variis en malsamaj tempoj. En frua periodo kun-entombigo havis nenian difinitan manieron. La entombigitaj kadavroj estis metitaj unu sur alia, sen septo inter si kaj sen distingo de seksoj kaj aĝoj. Poste la entombiga maniero ŝanĝiĝis, kaj kun-entombigoj estis plenkreskaj viroj kaj virinoj, aŭ plenkreskuloj kaj infanoj. En malfrua periodo formiĝis maniero de kun-entombigo de geedzoj. La edzo kuŝis surdorse kaj la edzino surflanke aŭ surdorse, kun fleksitaj membroj.

Oni kun-entombigis ankaŭ objektojn, du-tri en la frua periodo kaj ĉ. cent en la malfrua periodo. La nombro kaj kvalito de entombigitaj objektoj montras, ke jam aperis diferenco inter riĉo kaj malriĉo en la malfrua periodo de la primitiva socio. Krom ŝtonaj iloj, plejparto de la entombigitaj objektoj estas koloraj ceramikaĵoj. Tial Liuwan havas la nomon "vilaĝo de koloraj ceramikaĵoj sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo".

Ni vizitis la ekspozicion de elterigitaj objektoj de Liuwan, akompanate de s-ro Chen. Tie oni eksponas kolorajn ceramikaĵojn, kiuj reprezentas malsamajn periodojn de la primitiva socio. S-ro Chen diris al mi, ke la eksponataj koloraj ceramikaĵoj estas faritaj el subtila argilo, kaj ke ili estas malmolaj kaj aspektas flavaj aŭ ruĝe flavaj pro alta temperaturo de



bakado. La ceramikaĵoj estis poluritaj post la bakado. Sur ili estas desegnitaj ĉefe linioj spiralaj, ondaj, segildentaj aŭ cirklaĵoj, kaj ankaŭ desegnoj de bestoj kaj vegetaloj, precipe de rano.

Ni venis al la ekspona stando pri la Machang-tipaj koloraj ceramikaĵoj. S-ro Chen klarigis al ni, ke la eksponataj kvar koloraj ceramikaĵoj de malsamaj periodoj prezentas la evoluon de la ceramiko. Ŝan-

rano estas senkapa kaj la duona rano fariĝis dika onda linio. Kaj la desegno de rano sur la malfruperioda ceramikaĵo restas nur noma, nur post ekspertizo specialistoj konstatis, ke la desegno devenas de tiu de rano.

S-ro Chen diris, ke la elterigitaj koloraj ceramikaĵoj de Liuwan havas gravan lokon en la kolorceramika kulturo de Ĉinio pro siaj diversaj formoj,




Ceramikaĵoj en antikva tombo

ĝiĝis ne nur la formoj de la ceramikaĵoj, sed ankaŭ la desegnoj sur ili. Mi vidis desegnojn de ranoj sur ili, kiuj multe diferencas inter si. La desegno de rano sur la fruperioda ceramikaĵo estas facile rekonebla, prezentanta kompletan aŭ duonan ranon, kies malsupra parto estas anstataŭita de onda linio, kio donas la impreson, ke la rano tretas akvon kaj tuj elsaltos el la akvo. La desegno de rano sur la mezperioda ceramikaĵo sin prezentas abstrakte: la kompleta

kompleksaj kaj belaj desegnoj kaj originalaj stiloj de arto. Montrante per fingro ceramikan poton, li diris, ke ĝi estas kolora ceramikaĵo kun nudhoma reliefo. La poto, duansa, altas 33.4 cm. Ĝia aperturo havas diametron de 19 cm kaj ĝia meza parto iom svelas. Inter ĝiaj kolo kaj ŝultro ne troviĝas klara limo. Ĝia fronto surhavas koloran reliefon de nuda virino. Ĝi estas rara kaj konservata de la ŝtato.



Ceramika poto kun desegnaĵo de nuda homo



Du-orela ceramika vazo

Ceramikaĵo kun desegno de rano

Kolora ceramikaĵo





## AMUZOJ

### Humuraĵoj

#### FANFARONO

A diris: "Mi havas gigantan tamburon. Oni aŭdas mian tamburadon je 100 kilometroj fore."

B diris: "Mi havas grandan bovon. Kiam ĝi trinkas akvon ĉe la suda bordo de la rivero, ĝi povas



etendi sian kapon norden de la rivero."

A kapskuante, demandis: "Kie estas tia granda bovo?"

B diris: "Sen mia bovo, kiel vi povas trovi la grandegan bovoleon por kovri vian tamburon?"

#### MI LERNOS POSTE

Lernanto: "S-ro instruisto, ĉu estas malfacile lerni Esperanton?"

Instruisto: "Kompreneble malfacile en la komenco, sed facile poste."

Lernanto: "Do mi lernos poste."

#### Interesaj demandoj

Tre facilaj estas la jenaj demandoj, tamen oni ofte donas erarajn respondojn. Nun provu.

1. Foje, en aŭtobuso mi vidis, ke nur 1/3 de la veturantoj aĉetis bileton, kio tamen estas indifera por la ŝoforo kaj kondukto. Kial?

2. Mi havas riverojn sen akvo, montarojn sen tero, arbarojn sen arbo kaj urbojn sen domo.

Kio estas mi?

3. Estas demando, sed ĝin respondas oni neniam per "Jes".

Kio estas la demando?

4. Du hundoj vetkuras, unu rapide kaj la alia malrapide. Ĉu vi scias, kiu hundo ŝvitas pli multe? (Solvaj troveblaj en ĉi numero)

## Karikaturoj

### Interesaj aferoj en la amo



Piediri kun bicikloj.



Kun ombrello volvita en pluvo.



Diri vidalvide per letero.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Tasaru Vula deziras korespondi kun 35-60-j. viroj, kolektas pm., kaj bk. Adr.: Vlatadon 5, 546 34-Thessaloniki, Greece.

\* Jurgita Kaniatускаite, 18-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Skinijos 4, Vezaičiai 235845, Klaipeidos raj, Litovio, USSR.

\* Kunlaboru! Ĥoro Undarirê,

kun fakagado pri negra afrika kulturo, bezonas, urĝe, partiturojn kun voĉarango, specife pri afrika folkloro por enriĉigi kaj ampleksigi ĝian muzikan repertuaron. Bonvolu sendi helpaĵon al: Ĥoro Undarirê, Rua Nilo Pecanha, 30-Porto Velho BR-35500-Divinopolis-MG, Brasil.

\* Ladislava Tlachova dez. kor. tm. Adr.: Probulov 47, 39807 Orlik nad/Vetavou, Ĉeĥoslovakio.

\* S-ro Jaime Pous dez. kor. tm. Adr.: Apartat de Correus n-o 24292-08080 de Barcelono, Hispanio.

\* Vadim Ĉajkin, studento, dez. kor. tm. pri ĉt kaj ŝatas reciprokajn vizitojn. Adr.: p.k.

124, Cjurupinsk-1, USSR - 326520.

\* Jaroslav Ostapuk, 21-j., dez. kor. tm. pri jugo, meditado, vegetarismo, astrologio k.s. kaj esperas seriozan longdaŭran kaj fruktdonan kunlaboron. Adr.: "Sekai", Box 175, Postamt, SU-220050, Minsk, USSR.

\* Mi estas niponano, 29-jara vendisto. Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj kaj mi volas korespondi ankaŭ kun kleraj esperantistoj, kiuj bonege komprenas klasikan formon de Esperanto. Mi deziras ilin el Okcidenta Eŭropo. Mi ja povas korespondi ankaŭ kun blinduloj per brajlo. Adr.: Harada Tsukuru, Hakuzan 2-7-4, Kumamoto-si, 862 Nippon.

# Kvieta kaj komforta kvadrata korto de Pekino

Teksto de LI QIANG

Fotoj de WU XINHUA

**L**A plej tipaj loĝejoj de norda Ĉinio estas la kvadrataj kortoj de Pekino. Kiel tradiciaj loĝejoj, ili aperis jam en Yuan-dinastio (1271-1368), sed la nun ekzistantaj plejparte konstruiĝis post falo de Qing-dinastio (1636-1911) kaj antaŭ la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento.

La kvadrataj kortoj estas ĉirkaŭitaj ĝenerale de la domoj aŭ muroj orienta, okcidenta, norda kaj suda. Interne de la korto la domarango estas farita laŭ la principo de feŭda kastismo, t.e. la domoj simetrie staras ĉe la norda-suda mezlinio de la korto. Pro malsamaj areoj kaj pozicioj la kortoj estas grandaj aŭ malgrandaj.

Ĝenerale, la fenestroj de la domoj ne rigardas eksteren, escepte de tiuj de la sudaj domoj, kiuj havas malgrandan fenestron tre altan por esti prilumataj. En la korto nur la pordego kondukas al la ekstera mondo. Tial kun fermita pordego, la korto tute estis izolita medio. La loĝantoj de la kvadrataj kortoj malofte kontaktiĝis kun najbaroj. Tute izolitaj, oni vivis trankvilan vivon en la malgranda korto. Oni povas diri, ke la kvadrataj kortoj estis kvietaj, komfortaj nestoj, kiujn pekinanoj trovis en la socia tumulto. Ĝuste en tiaj kortoj la pekinanoj pasigis generacio post generacio tre longan tempon.


Dank' al la socia progreso, la hodiaŭa Pekino aspektas tute nove: La antaŭaj stratetoj plejparte estis larĝigitaj kaj asfaltitaj, ambaŭflanke de ili staras altaj domoj. La malnovaj kvadrataj kortoj pli kaj pli malmultiĝis, difektiĝis kaj maloportuniĝis. La loĝantoj de la kvadrataj kortoj plejparte deziras transloĝiĝi en modernajn domojn. Tamen antaŭ la arbare starantaj domoj, oni neniam forgesas la vivon en kvadrataj kortoj. Por reflekti la malnovajn trajtojn de Pekino kaj vivon de pekinanoj, la Pekina Registaro decidis rezervi iujn stratetojn kaj kvadratajn kortojn kaj fiksas al ili panelon, sur kiu legiĝas "Protektenda Historia Restaĵo en Pekino".

Ĉiufoje, kiam mi iras al la suda parto de Pekino, mi bicikle preteriris mallarĝan straton Laoqianggen, ĉar ĉe ties okcidento kuŝas iu kvadrata korto, kiu ĉiam rememorigas min pri mia infaneco. Tie estis mia hejmo kaj en tiu korto mi vivis 15 jarojn.


La malantaŭa muro de fronta domo









La pordo de interna korto




En interna korto

Kvadrataj kortoj





Mastroj revenintaj de laboro



Surĉevaligaj ŝtonoj antaŭ la pordo jam fariĝis historiaj restaĵoj.





Origine, miaj malriĉaj prauloj vivis en malgranda montvilaĝo en Fujian-provinco, sudorienta Ĉinio. Dank' al la diligenta studado, mia praavo fariĝis fama kuracisto kaj estis venigita en imperiestran palacon. Tiele li kaj lia tuta familio venis de Fujian en Pekinon kaj enloĝiĝis en tiu imponeta korto.

Kiel ĉiuj aliaj kvadrataj kortoj rigardantaj al sudo, ankaŭ ĝia pordego troviĝas en sudoriento de la korto, tio signifas bonaŭguron laŭ la ĉina moro. Kun levitaj kornicoj la pordo-turo aspektas pompe. Oni kutime nomas ĝin turo, sed fakte ĝi estas nur iom pli alta ol la tegmento de la suda domo. Sur la perono ambaŭflanke de la pordego, sidas po unu ŝtona tamburo kun reliefigitaj bestetoj sur si. Laŭ legendo, tiuj bestoj estis filoj de drako kaj destinitaj por gardi la pordon.

La pordego estis riglita de matene ĝis vespere. Reveninte de lernejo, mi devis forte frapi je la feraj ringoj sur la pordo, por ke oni malfermu ĝin al mi. Poste oni instalas sur ĝi elektran sonorilon, kiu multe faciligis al mia voko. Malantaŭ la sojlo alta je 30 cm., estas tegmentita pordega enirejo kun muroj ambaŭflanke. La pordega enirejo, kun areo egala al unu ĉambro, similas al kaverno, ĉar kiam oni fermas la pordegon, ĝi estas apartigita for de la ekstera mondo kaj kiam oni malfermas la pordegon, la lumoj eniras internen. En la okcidenta muro estas pordo por eniri en la unuan sudan ĉambron, kiu funkciis kiel pordistejo.

La pordega enirejo frontas kontraŭ la suda muro de la orienta domo. Turninte sin okcidenten tra la pordega enirejo, oni venas antaŭ la sudan domon. Krom tiu de la pordistejo, la pordo de ĉiuj sudaj ĉambroj rigardas al nordo. Mallumaj kaj humidaj, la sudaj ĉambroj havas la plej malbonajn kondiĉojn el tiuj en la korto, pro tio oni ne loĝis tie kaj lokis en ili bagatelaĵojn.

La orientan kaj okcidentan domojn ligas muro en alteco de homo, meze de ĝi estas pordeto. Interne de la pordeto staras gravurita ligna ekranilo. Ĉio tio dividis korton en du partojn. La mallarga trairejo antaŭ la suda domo nomiĝas ekstera korto kaj interne de la pordeto ja estas interna korto, kies formo similas al kvadrato. Antaŭ la orienta kaj okcidenta domoj, proksime de la malalta muro staras po unu granda soforo, de kiu la korto ĉiam estas ombrata en somero.

La norda domo estas alta. Ĝi staras sur la bazo je 4 ŝtupoj, dum la orienta kaj la okcidenta kun verando estas malaltaj je unu ŝtupo. La norda domo estas la ĉefa konstruaĵo de la korto. Ĝi konsistas el 3 ĉambroj. La meza ĉambro estas salono. Sur ĝia norda muro pendis pentraĵoj kaj legiĝis koplo, ĉe la muro kuŝis longa tablo kun florvazoj kaj incensujo. Meze de la tablo majeste staris ligna tabulo memore al la prauloj. Antaŭ la longa tablo troviĝis kvadrata tablo, ambaŭflanke de ĝi sidis du brakseĝoj. En la

festaj tagoj kaj precipe en la Printempa Festo la kvadrata tablo servis kiel altaro, sur kiu oni metis vinon, pladojn kaj diversajn kukojn. Sidiginte sur la brakseĝoj, la patriarko akceptis la gratulon de siaj posteuloj, kiuj laŭvice adorkliniĝis antaŭ li kaj esprimis al li siajn bondezirojn. Poste tiuj malnovaj moroj estis ne plu videblaj, sed oni ĉiam diskutis pri gravaj aferoj en la salono. Mi memoras, ke la salono funkciis kiel funebrejo, post kiam miaj praavino kaj avino forpasis.

Ambaŭflanke de la salono troviĝas dormoĉambro de la plejaĝuloj. Tiuj du ĉambroj, la plej bonaj en la tuta korto, estas varmaj vintre kaj malvarmetaj somere, dank' al la verando kaj grandaj fenestroj. Miaj praavo kaj avo jam forpasis, kiam mi estis tre juna, tial en la du ĉambroj de la norda domo loĝis mia avino kaj praavino.

Aliaj familianoj loĝis en la orienta kaj okcidenta domoj ĉiu el 3 ĉambroj. Miaj gepatroj, frato kaj mi loĝis en la okcidenta domo kaj la familio de mia onklino en la orienta. La aranĝo de la orienta kaj okcidenta domoj estas simila al tiu de la norda: la meza ĉambro estas salono kaj ambaŭflanke dormoĉambroj. Kun kahela planko kaj grandaj fenestroj la ĉambroj estas komfortaj en somero, sed en vintro ili estas malvarmaj eĉ kun granda forno. Ĉiutage mi vidis, ke sur la fenestroj estas glaciaj bildoj, similaj al montoj, nuboj kaj aliaj mirindaĵoj. La ŝanĝiĝemaj glaciaj bildoj ofte vekis mian scivolemon.

Ĉe la nordokcidento de la korto kuŝas granda ĉambro destinita por teni bagatelaĵojn. Ni nomis ĝin granda obskura ĉambro, ĉar en ĝi estas mallume. Norde de ĝi estas du ĉambroj, unu servis kiel kuirejo kun luko, kuirforno kaj kranoj kaj la alia, kiel tualetejo kun banujo kaj aliaj instalaĵoj.

Tiam mankis moderna kloako kaj oni devis mem solvi tiun problemon de sia korto. De tempo al tempo oni venigis kamparanojn, por ke ili forportu per fekaĵoportita ĉaro malpuraĵojn el la granda fosaĵo meze de la korto sub la kvadrataj brikoj. Poste oni denove metis la kovrilon, ŝutis teron sur ĝi, masonfermis ĝin per brikoj kaj la korto denove aspektis kiel antaŭe.

Antaŭe, en ĉiu kvadrata korto loĝis nur unu familio, sed poste, pro rapida kresko de la loĝantaro kaj malrapida domkonstruado en unu korto enloĝiĝis du, tri... eĉ pli ol dek familioj. Post la tertremo en Tangshan en 1976, en multaj kortoj de Pekino senorde konstruiĝis kabanoj ŝirmantaj kontraŭ tertremo, kiuj poste fariĝis dometoj. Tiele, tiuj tipaj kvadrataj kortoj perdis siajn originajn trajtojn.

Kun la socia progreso, modernaj domoj anstataŭis iom post iom la malnovajn kvadratajn kortojn. En 1960, ankaŭ mia familio forlasis la korton, kie loĝis 4 generacioj de mia familio, kaj transloĝiĝis en etaĝdomon. De tiam, mi ne plu loĝis en kvadrata korto. 30 jaroj pasis en palpebruma daŭro, sed mi neniam forgesis la kvietan kaj komfortan kvadratan korton. ■



En câmbro

En korto







*Sur la stepo de Interna  
Mongolio*

Jurtoj sur la stepo



La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kovras 1.1 milionojn da kvadrataj kilometroj kaj estas la norda limregiono de Ĉinio. Ĝi limtuŝas nordokcidente kun Sovetunio kaj la Mongola Popola Respubliko. Ĝi abundas je grasaj herboj kaj estas konata kiel grava bazo de brutobredado de Ĉinio. Ĝi havas pli ol 20 milionojn da loĝantoj, inter kiuj ĉefe estas mongoloj kaj krome ankaŭ daŭroj, oroĉenoj, hanoj kaj evenkioj.

La mongoloj okupiĝas ĉefe pri brutobredado. En la pasinteco ili vivis nomade. Dank' al la granda konstruado sur la stepo ili havas fiksloĝejon. Kun la disvolviĝo de produktado multe pliboniĝis ilia vivo.

Fotoj de **BAYINMENGHE**



Al alia paŝtejo



En jurto

Preparado de lakta manĝaĵo





Paŝtisto kaj infanoj  
Foto de **BAOGELI**





# “Polusa Stelo” — bona horloĝo



Yantai estas konata kiel lulilo de la ĉina horloĝa industrio. La bonkvalita, bela horloĝo kun marko “Polusa Stelo”, produktita de la Yantai-a Ligna-horloĝa Fabriko, famas en- kaj eksterlande. Post streĉiĝo la tablohorloĝo povas iri sinsekvajn 17 tagojn. Ĝia minutmontrilo povas esti movata antaŭen kaj malantaŭen. Ĝi povas sin ĝustigi kaj normale iri, kiam ĝia inklino ne superas 2 gradojn. Kaj krome, la fabriko produktas ankaŭ mekanikajn pendolhorloĝojn por 15 kaj 31 tagoj, du-kalendaran horloĝon, plankan horloĝon Z3f, kvarcan horloĝon BZ11, plankan horloĝon BF kaj plankan kvarcan horloĝon kun ornamita pendolo. Tiuj horloĝoj de 80 specoj vendiĝas kiel en Ĉinio, tiel ankaŭ en 40 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo, Latin-Ameriko kaj Oceanio.

La Yantai-a Ligna-horloĝa Fabriko havas historion de 70 jaroj. Kun alta teknologio, ĝi produktas diversajn belajn horloĝojn, kiuj ne nur mezuras tempon, sed ankaŭ ornamas ĉambron.

En 1990 ĝi produktis 2 000 000 kvarcajn horloĝojn, kiuj atingis la internacian avangardan nivelon. Nun ĝi estas la plej granda kaj plej moderna entrepreno de kvarcaj horloĝoj en Ĉinio.

Klientoj de diversaj mondpartoj estas bonvenaj.

Adr.: Nr. 157, Str. Nandajie, Yantai, Ĉinio

Telefono: 245571

Telegramo: 2606